

maandelijsk tiidschrift, verantwoordelijke uitgever: g. maertens, prins leopoldstraat 51, b-8310 brugge

1980 septembro

73-a jaro

n-ro 897 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

# esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)  
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Stokholmo: Sepdek kvin jarojn post Bulonjo



## Vi trovos,

ke ni dediĉas nur kelkajn paĝojn de la numero al la kongresa ĉeftemo — "Diskriminacio", kvankam la Kongreso mem dediĉis al ĝi duonon de siaj tempo kaj spaco. Ni faras tion, ĉar ni supozas, ke vi estas en ĉi tiu Movado unuavice pro via intereso pri la monda lingvoproblemo kaj ties solvo, kiu nomiĝas Esperanto. Estante kompletaj personoj, kun multflanka intereso pri ĉiaspecaj problemoj de ĉi tiu mondo, vi ja interesiĝas aŭ devus interesiĝi ankaŭ pri aliaj aspektoj de, ekzemple, diskriminacio, ol estas tiuj, kiuj rekte koncernas la komunikajn malfacilaĵojn kaj maljustaĵojn de la homaro. Kial? Ĉar oni povas lerni de aliaj movadoj kaj organizaĵoj, ĉar necesas koni la aliajn, antaŭ ol ni eĉ provas informi ilin aŭ konvinki ilin pri niaj streboj kaj celoj. Tamen, ni ne tiel entuziasmu pri tiu lernado pri aliaj, ke tute manku al ni tempo okupiĝi pri ni mem, t.e. pri la Internacia Lingvo, pro kiu ni ekzistas kiel aparta Movado. Jen, tial la bildo, kiun pri la Kongreso en Stokholmo kreas ĉi tiu numero, iom diferencas de la faktaj okazintaĵoj komence de aŭgusto en la sveda ĉefurbo. Ni do ne klopodis doni al vi fotografiaĵojn de la Kongreso, ni provis por vi pentri bildon, kiu emfazas unujn kaj forgesas aliajn detalojn. Helpis en tiu pentra laboro ĉi-foje Mauro Nervi el Italio, kiu dum la Kongreso funkciis kiel helpa redaktoro. Do, ne kulpas nur la redaktoro ĉi-numere! "Hej!", diras la svedoj.

## Enhavo

- 141 65a Universala Kongreso de Esperanto: Stokholmo tamen estis alia (sm)
- 142 Solena Inaŭguro: "Tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian"; Parolado de la Alta Protektanto: Per helpo de la vorto (Ingemund Bengtsson)
- 144 Skribaj salutoj al la Kongreso: Kun granda respekto
- 145 Inaŭgura parolado de d-ro John C. Wells pri la kongresa ĉeftemo "Diskriminacio": Sisteme maljusta konduto kontraŭ iu difinita homgrupo
- 146 Kongresa ĉeftemo: Dum 30 laborhoroj
- 148 Malferma solenaĵo: Okazis promociiĝo: Prezidanto fariĝis simpla estrarano (S. Milojević); Kongresa rezolucio
- 150 La Komitato kaj Estraro: Ŝanĝoj kaj kontinueco (V. Sadler)
- 152 Ĝeneralaj kunsidoj: Recenzo de la Estrara Raporto
- 153 Internacia Somera Universitato, ĉeftemaj prelegoj, Esperantologia Konferenco: Abundo kaj kvalito
- 154 Teatro: Ekstreme vorta teatro (M. Nervi); Kapablo ornami (Mauro Nervi); Spektantoj kunaŭtoris (P. Daŝgupto)
- 155 Artaj aranĝoj: Ne laŭplana, sed ĝuinda vespero (Diccon Masterman); Ses koncertoj; Belartaj Konkursoj de UEA 1980: Premio por romano
- 156 Kelklinie pri... (mallongaj notoj pri aliaj kongresaj programeroj)
- 157 Solena Fermo: Alporti la oficejojn al la membraro
- 158 36a Internacia Junulara Kongreso, Rauma, Finnlando: Kongreso vekis grandan interesiĝon de la finna loĝantaro; Maratone — ĉu bone? (Peter Weatherby, Y. Bellefeuille, I. Jackson)
- 160 Kongreseroj... (iom gajaj kongresaj notoj)

## La kovrilo

La nova Estraro de UEA borderas supre kaj malsupre la centran foton de nia kovrilo. Kial la Estraro tie? Nu, ĉar ni havas tian teknikan desegnon de la revuo, ke io absolute devas aperi sur la kovrilo. Ni konsentu, ke plej ofte necesas perlabori sian lokon sur la kovrila paĝo. Sed, vi nun konsentu, ke eblas uzi la kovrilon kiel antaŭpagan ĉekon pro laboro poste farota. Ĉiukaze, en la supra vico de maldekstre estas: Grégoire, Flóra, Baldur kaj Eliza. Sube (de maldekstre) vizaĝas antaŭ vi: Humphrey, Petăr, Ursula kaj Renato. Se mankas al vi la familiaj nomoj kaj funkcioj, serĉu ilin en la apuda kolumno ĉi-paĝe. Ĉiuj kovrilaj (kaj multaj aliaj) fotoj ĉi-foje estas de Zdravko Nikolov.

esperanto 1980 septembro

## esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 91 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

## Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj, edukado kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.



**65a UNIVERSALA KONGRESO  
DE ESPERANTO  
STOKHOLMO, 1980 08 02 – 08 09:**

## Stokholmo tamen estis alia

„FOLKETS HUS” (Domo de la popolo) en Stokholmo, komence de aŭgusto ĉi-jare, transformiĝis en veran „domon de la popoloj”. Ĝi gastigis 1807 aliĝintojn al la 65a Universala Kongreso de Esperanto. Ili venis el 52 diversaj landoj, el ĉiuj anguloj de la terglobo. En la lasta jardeko, nur la kongresoj en Londono (1971) kaj Varno (1978) estis pli amasaj.

Sepdek kvin jarojn post la 1-a Universala Kongreso en Bulonjo-sur-Mar (1905), kion signifas la 65a UK en Stokholmo? Laŭ kio ĝi restos memorinda en la longa vico de la kongresoj? Kio faras Stokholmon nova kaj atentinda en tiu 75-jara ĉeno pro kiu plejmulto da aliaj movadoj kaj organizaĵoj envias nin?

Unuavice, Stokholmo estis la kongreso de elektoj en UEA. Kvankam tio ne sonas nove, ĉar la elektoj okazas ĉiun trian jaron, Stokholmo estis tute nova kaj unika ĝuste ĉi-rilate. Oni apenaŭ rimarkis la elektojn tie. Ili okazis tiel trankvile, tiel senpatose, kun kompleta foresto de dramaj, de tragediaj aŭ komediaj elementoj. Kaj, ĝuste tio estas nova en la lastatempa historio de la Esperanto-movado. Ŝanĝiĝis la portantoj de la gvidaj funkcioj en UEA, sed neniu foriris. La Movado perdis neniun. Ĉiuj restas por pluaktivi, kun novaj respondecoj, sur aliaj laborkampoj, pri novaj taskoj.

Ankaŭ en Stokholmo iu publike asertis, ke niaj kongresoj ne ŝanĝiĝis. Nu, se vi volas malvidi la ŝanĝojn, ni konsentu, ke ili efektive ne okazis. Tamen, laŭti pri tia konstato similas al aserto, ke niaj tagoj ĝis nekred-

eblo similas unu la alian. Ili ĉiuj komenciĝas per mateno kun eventuala sunbrilo, tagmeze ni provas paŭzeti kaj manĝi, vespere oni reiras al la sama loĝejo kaj tie vidas aŭ ne vidas la samajn vizaĝojn, manĝas el samaj teleroj kaj kuŝiĝas en la saman liton. Jes ja, vere, simile okazas pri la Universalaj Kongresoj. Komence ili havas inaŭguron, meze venas ekskursita tago, la tuto finiĝas per fermo. Inter tiuj tri programaj eroj okazas balo, kunsido, akcepto, diskuto, bankedo, teatraĵo, kunveno, koncerto, kafaŭzo, kurso, prelego ktp.

Ĉiu nia kongresa balo estas nova, ĉar ĝi okazas jen en adaptita ĉevalejo, jen en vera palaco, kiel ĝuste en Stokholmo. Niaj prelegoj en Stokholmo estis novaj, ĉar novis la temoj, la ejoj, plej ofte ankaŭ la prelegantoj kaj la publiko. Du el la tri teatraj prezentaĵoj en la Kongreso havis sian movadan premieron en Stokholmo. De jardekoj, la kongresa bankedo ne estis lokita en tiel dignan ejon. En almenaŭ kvar el la ses koncertaj kongresaj aranĝoj rolis artistoj, kiuj neniam antaŭe prezentiĝis antaŭ la sama publiko. La tuta historio de niaj kongresoj ne memoras tiel fundan pritrakton de la kongresa temo, kiel okazis en Stokholmo. Unufoje oni faris insistajn provojn partoprenigi en la diskutoj ankaŭ la komencantojn. Aŭkcio estis stokholma programero, kiun malsukcese provis memori eĉ tiuj, kiuj antaŭ 46 jaroj partoprenis la 34an UK en la sveda ĉefurbo. La memserva librovendejo en Stokholmo estas novaĵo transprenita el Lucerno pasintjare. Kaj, cetere, la stokholma inaŭguro similis al la koncerta programero en Bruselo antaŭ dudek kaj en Vieno antaŭ dek jaroj nur laŭ sia nomo. La Interkona Vespere en Stokholmo estis funde nova. Unufoje en la lastaj jardekoj almenaŭ, la kongresanoj en Stokholmo ricevis en siaj dokumentujoj faskon da informiloj pri Esperanto en la kongreslanda lingvo. Krom la relative nova broŝuro pri la loka lingvo (unufoje en Rejkjaviko antaŭ tri jaroj), ĉi-jare venis al ĉiu donace ankaŭ la libreto *Kion manĝi kaj kie?* en la sveda ĉefurbo. Ni ne memoras, ke niaj kongresoj antaŭe atentis la kongreslandajn lingvistojn per „Enkonduko al la hodiaŭa Esperanto”, kiel okazis en Stokholmo.

Se ni aldonas, ke la 65a UK en Stokholmo okazis ankaŭ en „nova” urbo kaj en novaj, tre konvenaj ejoj, kun partopreno de pluraj centoj da kongresaj novicoj, ĉu ni nun rajtas aserti, ke la Kongreso en Stokholmo estis tamen alia kaj funde nova aranĝo, kiu konservis kelkajn tradiciajn nomojn kaj skemojn, tiel necesajn kaj utilajn en movado, kiu klopodas krei sian tradicion?

Funde ŝanĝiĝis la atmosfero kaj programo de la Universalaj Kongresoj dum la lasta jardeko. Stokholmo estis tute alia eĉ kompare kun Lucerno pasintjare. La 65a UK lanĉis kelkajn gravajn kaj plusekvendajn kongresajn iniciatojn. Dankoj pro tio iras unuavice al la multnombra sed persista kaj celkonscia Loka Kongresa Komitato. Al ĝi ŝuldiĝas ankaŭ la baza konstato, ke la 65a UK estis sukcesa kaj fruktodona aranĝo, pro kiu valoris pagi eĉ tiujn altajn prezojn per kiuj Svedio surprizis nin komence de aŭgusto en sia bela ĉefurbo.



Humphrey Tonkin, la ĝisnuna prezidanto de UEA, malfermis la 65an Universalan Kongreson de Esperanto en Stokholmo (Foto: Z. Nikolov)

„Tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian”

LA GRANDA KONGRESA FLAGO, tiu plej fidela partoprenanto de ĉiuj Universalaj Kongresoj de post 1939, en la Solena Inaŭguro de la 65a UK, dimanĉon, la 3an de aŭgusto 1980 en Stokholmo, venis iel intime antaŭen, renkonte al la publiko, pro la ronda scenejo, kiu penetris profunde inter la vicojn de la ĉeestantoj. La verdo de la Flago ŝajnis esti optika rezulto de la svedaj koloroj bluo kaj flavo, kiuj ĝin borderis ambaŭflanke. Ankaŭ la florabundo, kiu ornamis la podion, proponis al la okulo nur la harmonion de tiuj tri koloroj. Same pri la kongresaj afiŝo kaj insigno. Delonge niaj kongresoj ne spertis tiel delikatan ornamguston, tian solenecon en la Solena Inaŭguro.

Sur la podio sidas la tuta Komitato de UEA, kiu tiel helpas solvi la kapacitoproblemon de la salonego, kreitan de neatendita alfluo de pluraj centoj da kongresanoj. (Tamen, pluraj dekoj da homoj sekvas la

Inaŭguron sur televidaj ekranoj en la vestiblo de la kongresejo.) Ĉe la prezida tablo troviĝas estraranoj kaj aliaj funkciuloj kaj gastoj: Maertens, Grattapaglia, Bormann, Stöp-Bowitz, Sadler, Ingemund Bengtsson (la Alta Protektanto), Tonkin, Roland Lindblom (prezidanto de la LKK), John C. Wells (parolonto pri la kongresa ĉeftemo), Szabó-Felső kaj Brunetto Casini (vicprezidanto de TEJO). Leviĝas Humphrey Tonkin kaj diras:

”Bonvenon al Stokholmo! Bonvenon al la 65a Universal Kongreso de Esperanto!” Kiam forflagras la unua kongresa aplaŭdo, Tonkin omaĝas la gastigantan landon i.a. per jenaj vortoj: ”En la frua historio ĝiaj komercistoj penetris ĝis la suda Eŭropo kaj Azio, kaj ĝiaj ŝipoj, kiel tiuj de la najbaraj landoj, plugis vojon trans la maroj al plej foraj landoj. En posta epoko, en la 17a jarcento, ĝiaj armeoj konkeris grandan parton

## PAROLADO DE LA ALTA PROTEKTANTO, INGEMUND BENGTTSSON, PREZIDANTO DE LA SVEDA PARLAMENTO:

### Per helpo de la vorto

GESINJOROJ, Esperanto-amikoj, mi bonvenigas vin ĉiujn al Svedio. Multaj el vi veturis longan vojon por veni ĉi tien. Multaj el vi estas en nia lando por la unua fojo. Mi scias, ke la Kongreso prenos la plejparton de via tempo, sed mi tamen esperas, ke vi vidos ion de nia lando kaj ke vi konatiĝos kun la cirkonstancoj ĉi tie. Via restado ĉi tie estu memorinda kaj agrabla. Ni havas multajn internaciajn kongresojn en Stokholmo. Sed via Kongreso estas malsimila al ĉiuj kiujn ni havis. En ĉi tiu Kongreso ĉiuj delegitoj povas kompreni unu la alian sen interpretistoj. Ĉiuj parolas la saman lingvon. Neniu estas



Foto: P. Peeraerts


diskriminaciata en tiu rilato. La Kongreso okupiĝos pri unu el la plej gravaj problemoj de nia tempo, nome diskriminacio. Ĉi tiun problemon oni devas aliri el multaj flankoj. Necesas multaj decidoj en la parlamentoj de la landoj por solvi ĉi tiujn gravajn problemojn. Por tio necesas informoj kaj premo al la leĝofarantoj, kaj tion oni devas fari per helpo de la

de la balta regiono kaj ŝtormis tra la centra Eŭropo. Sed Svedujo poste lernis. En la 19a jarcento ĝi fariĝis pioniro en la evoluo de sociaj servoj. Ekzistas tuta listo de novaj sociaj atingoj, kiuj okazis unue ĝuste en tiu ĉi lando. Jam en la jaro 1843, ekzemple, Svedujo starigis la bazon de publika saneca servo. Tuj en la posta jaro ĝi enkondukis universalan elementan klerigon. Ĝi pioniris pri la rajtoj de virinoj, pri religia libereco, pri rajtoj partopreni la ekonomian vivon de la socio." Tonkin ligas la evoluon de Svedujo kaj ĝian internacian rolon al la kongresa ĉeftemo kaj diras:

"Tiu spirito de sindono, tiu deziro trovi raciajn solvojn al sociaj problemoj, tiu skandinavia morala sento, igas Svedujon natura aliancano de Esperanto kaj la Esperanta spirito. La Esperanto-movado estas samtempe morala potenco kaj pure praktika movado. Svedujo ĉiam havis kaj havas forton kiel lando de Esperanto. Tamen, la publiko en ĉi tiu lando estas forte sub influo de aliaj kulturoj, precipe la anglalingva kulturo.

Kaj ĝi riskas perdi tiun senton de la propra identeco, kiu estas antaŭkondiĉo por vere efika internacieco. Nur se ni scias, kiuj ni estas, nur se ni konas niajn proprajn lokajn kaj naciajn tradiciojn, ni povas kompreni, kial tiuj gravas al aliaj homoj kaj en kio konsistas la tradicioj kaj kutimoj de aliaj homoj. Mi salutas speciale tiujn svedojn, esperantistojn kaj neesperantistojn, kiuj komprenas la gravecon de la skandinavaj kulturaj valoroj, kaj samtempe komprenas la gravecon kaj neceson, ke ni, skandinavo kaj neskandinavo, el ĉiuj nacioj kaj raso, lingvoj kaj kredoj, el ambaŭ seksoj, komune kreu pacan, harmonian, sendiskriminacian mondon. Por la svedoj, la lingvoj de tiu mondo estas la sveda kaj Esperanto, la sveda por svedaj aferoj, kaj la Internacia Lingvo por internaciaj aferoj."

En sia bonveniga alparolo Roland Lindblom, la prezidanto de la LKK, konfesas, ke "saĝa takso antaŭ unu jaro estis, ke 1300 ĝis 1400 esperantistoj venos al Stokholmo. . . Hodiaŭ la nombro de aliĝoj estas sur-



Inaŭgura parado de la gastoj: La japana, bulgara, brita kaj franca diplomatoj, kun siaj interpretistoj en Stokholmo

vorto. Sed ne sufiĉas, ke la lando kreas leĝojn kontraŭ diskriminacio. Ni lernis tion. Oni devas konvinki la homojn kaj gajni ilin por la lukto kontraŭ diskriminacio. Tion oni devas fari per la vorto. Mi esperas, ke la rezulto de tiu ĉi Kongreso estos utila en la estonta lukto kontraŭ ĉiuj specoj de diskriminacio. Kompreni unu la alian estas grava kondiĉo por povi konvinki. Multajn miskomprenojn oni povas eviti, se oni komprenas unu la alian. Nia tasko estas konvinki plejeble multajn pri la bezono de lingvo, kiun la civitanoj de ĉiuj nacioj povas paroli flanke de la gepatra lingvo. Komuna lingvo estas sendube faktoro de paco. En la hodiaŭa maltrankvila mondo, ni devas gardi ĉion kio povas kontribui al pli bona kompreniĝo inter la popoloj. Estas kuraĝige vidi tiom da esperantistoj el pli-malpli la tuta mondo kune. Mi esperas, ke la Kongreso kontribuos al tio, ke pli da homoj en Svedio kaj en la mondo lernos Esperanton. Mi deziras al la Kongreso bonan sukceson en la grava estonta laboro.

voje al 1800." Tiam al la mikrofono iras la Alta Protektanto de la 65a UK, Ingemund Bengtsson, prezidanto de la Sveda Parlamento. Li parolas en Esperanto, tre klare, elegante kaj iel intime samtempe. Lian paroladon (vidu ĝin aparte, ĉi-sube) la kongresanoj ofte interrompas per aklamaj aplaŭdoj.

Muzikan paŭzon, kun du mallongaj pecoj de la svedaj komponistoj Ruman kaj Petterson-Berjer, sekvas voĉleĝo de la plej gravaj skribaj salutoj direktitaj al la Kongreso. Inter ili troviĝas letero nome de la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, salutmesaĝo de la Sekcio de UN pri Homaj Rajtoj, mesaĝo de la ĝenerala sekretario de la Monda Konferenco (1980) de la Jardeko de UN por Virinoj, letero de la ĝenerala sekretario de Organizo de Amerikaj Ŝtatoj kaj multaj aliaj leteroj kaj telegramoj. Fragmentojn de kelkaj el tiuj mesaĝoj ni aperigas akompane al tiu ĉi teksto.

Venas la vico de tiu tradicia inaŭgura revuo de la diplomaciaj reprezentantoj. Unue parolas (Esperante) d-ro H. Nedomansky, kultura konsilisto, nome de Aŭstrio. Sekvas s-roj Lettens, aferŝargito de la belga ambasado, kiu invitas al Antverpeno en 1982, kaj A.

Nunciato Santiago, brazila konsulo, kiu bonvenigas al Brazilio venontjare. Salutas ankaŭ s-ro Watling, sekretario pri informado ĉe la brita ambasado, kaj s-ro Ŝ. Matsuŝita, konsilisto de la japana ambasado en Stokholmo. La bulgara aferŝarĝito Z. Zahariev memorigas pri la sukcesaj Universalaj Kongresoj en sia lando. Ĉeestas la ĉeĥoslovaka ataŝeo pri scienco kaj tekniko, s-ro P. Vrba, kaj s-ro Wang Chin-sheng, la dua sekretario de la ĉina ambasado. Nome de la danaj registaro kaj kulturministro salutas s-ro H. Backer Hansen, aferŝarĝito, kaj nome de la franca ambasadoro parolas s-ro F. Simoneau, kultura ataŝeo. Denove en Esperanto, salutas s-ro K. Steinmar, kulturataŝeo kaj dua sekretario de la ambasado de Germana DR. Nome de la greka registaro parolas s-ro Ch. Karapanos, unua sekretario de la ambasado. Ĉeestas s-ro L. Eredics, konsilisto de la hungara ambasado. Oni laŭtlegas specialan telegramon, kiun al la Kongreso sendis s-ino Vigdis Finnbogadóttir, prezidento de Islando. Italion reprezentas d-rino L. Pallavicini, direktoro de la itala kulturinstituto en Stokholmo. Nome de Meksikio ĉeestas s-ro C. López, ambasada sekretario, kaj Nederlandon reprezentas s-ino Strijker, sekretario pri kulturaj aferoj kaj informado. La norvega registaro denove reprezentigas pere de speciale komisiita kongresano, ĉi-foje s-ro Otto Prytz, kiu anoncas ke la norvega ministerio pri eksteraj aferoj ĵus decidis utiligi Esperanton en sia informado kaj jam eldonis la unuan broŝuron. La ambasadoro de Pollando, s-ro Pawel A. Cieŝlar, eldiras sian longetan saluton en eminenta Esperanto. Ĉeestas ankaŭ la ataŝeoj de la sovet

ambasado, s-roj V. Timofejev kaj S. Aksjonov, kaj la konsilisto de la usona ambasado, s-ro E.M. Cohen. En la salono troviĝas ankaŭ la nobelpremiito pri fiziko, prof. Hannes Alfvén, reprezentantoj de la Sveda Asocio por Unuiĝintaj Nacioj kaj de pluraj aliaj neregista-



raj organizaĵoj. Diplomatoj de FR Germanio kaj Jugoslavio venis poste dum la kongresa semajno por sekvi parton de la kongresaj laboroj.

D-ro John C. Wells sekvas kun sia unua el entute tri prelegoj pri la kongresa ĉeftemo. (Vi trovas tiun paroladon aliloke en ĉi tiu revunumero.) Denove parolas la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, kiu diras i.a. jenon:

"Tiu ĉi Kongreso en Svedujo havas specialan signifon por la parolantoj de Esperanto. Antaŭ precize 75 jaroj, la fruaj parolantoj de nia lingvo kolektiĝis en Bulonjo-sur-Marco por partopreni la 1-an Universalan

## SKRIBAJ SALUTOJ AL LA KONGRESO:

### Kun granda respekto

"**ESPRIMANTE** mian grandan respekton por Esperanto mi sendas miajn plej sincerajn salutojn al la 65a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo, kun deziroj pri bonaj rezultoj en traktado de gravega temo 'Diskriminacio'."

**Vigdis Finnbogadóttir,**  
Prezidento de Islando

"... **TAMEN**, mi deziras certigi al vi, ke ni sekvas vian laboron kun granda interesiĝo. Efektive, la temo de la Kongreso rekte rilatas al la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj por kontraŭbatali ĉiujn formojn de diskriminacio kaj, tute specife, al la aktiveco entreprenita en la kadro de la Jardeko de Agado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion. Mi deziras al la Kongreso sukceson en ĝia laboro. Mi estus tre danka, se vi bonvolus sendi al ni ĉiujn koncernajn dokumentojn, inkluzive de la fina raporto pri la Kongreso."

**Theo C. van Boven,**  
dir. de la Sekcio de UN pri Homaj Rajtoj

"... **LA TEMO**, kiun vi elektis kiel temon de la Kongreso, estas profunde ligita al la plimulto de la grandaj

debatoj de nia epoko, kaj tial ĝi estas tre taŭga por asocio, kiu dediĉis sin al plivastigo kaj profundigo de la komunikigo kaj komprenigo inter la homoj. Por via Asocio mi havas la plej grandan respekton, kaj ĝiaj celoj certe harmonias kun tiuj de la Jardeko por Virinoj — egaleco, disvolviĝo kaj paco. . . . Mi estas certa, ke diskriminacio surbaze de sekso estos ekzamenita kaj vaste pridiskutita, kaj mi tre interesiĝos pri eventuala raporto pri la diskutoj, se vi eldonos ion tian poste. La rasismo restas, bedaŭrinde, unu el la hontindaĵoj de nia epoko, kaj mi estas certa, ke ankaŭ ĝi ricevos grandan atenton. Aparte interesas min la konstato, ke en via tagordo troviĝas ankaŭ la ekonomia diskriminacio inter la ŝtatoj. . . ."

**Lucille M. Mair,**  
ĝen. sekr. de la Monda Konferenco (1980)  
de la Jardeko de UN por Virinoj

"... **NIA ĜENERALA SEKRETARIATO** vidas kun aparta simpatio, ke temo de tia graveco, kiel la rasa kaj etna, seksa kaj ekonomia diskriminacio, estas elektita kiel ĉefa objekto por traktado kaj analizo de la delegitoj el proksimume 50 landoj, inter kiuj troviĝas kelkaj ŝtatoj-membroj de nia regiona Organizo. . . ."

**Alejandro Orfila,**  
ĝen. sekr. de Organizo de Amerikaj Ŝtatoj

Kongreson de Esperanto. Mi deziras citi kelkajn vortojn el la parolado, kiun faris Zamenhof en tiu Kongreso, ĉar tiuj vortoj validas ankoraŭ hodiaŭ. Ili estas vortoj iasence direktitaj al la ekstero. Mi hodiaŭ direktas ilin tute aparte al niaj diversaj gastoj ĉi tie. Zamenhof diris jene:

'Ni kunvenis hodiaŭ, por montri al la mondo, per faktoj nerefuteblaj, tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ni montros al la mondo, ke reciproka komprenigado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian, ke la muroj inter la popoloj tute ne estas io necesega kaj eterna, ke reciproka komprenigado inter kreitaĵoj de tiu sama speco estas ne ia fantazia revo, sed apero tute natura, kiu pro tre bedaŭrindaj kaj hontindaj cirkonstancoj estis nur tre longe prokrastita, sed kiu pli aŭ malpli frue nepre devis veni. . .'

Kaj mi diras al vi, gekolegoj, ke efektive ĝi venas, tiu spirito de reciproka komprenigado. Al niaj neesperantistaj gastoj mi deziras emfazi la signifon de tiuj vortoj de la iniciatinto de Esperanto. Ili estas aparte aplikeblaj al la sveda situacio. La skandinava tradicio estas kulture valorega. La sveda lingvo estas parto, preskaŭ fizika parto, de la hejmlando Svedujo. Vi svedoj vivas inter viaj vortoj, inter via lingva kadro, same kiel vi vivas inter la kampoj kaj dunoj kaj montetoj de Svedujo. Konservu tiun lingvon. Ŝirmu ĝin kontraŭ fremdaj influoj superflujaj, kiuj igos vin nerezoneblaj disde aliaj homoj. En mondo, kie multaj problemoj estas nesolvitaj, ni bezonas ĉiujn vidpunktojn, i.a. la svedan

vidpunkton, por serĉi solvojn. Vi konservu kaj fortigu tiun skandinavecon, tiun svedecon, kiun vi posedas. Kaj Esperanto estas en tio via amiko.

Ni kredas je kultura diverseco, je naciaj lingvoj, je lokaj lingvoj. Ni opinias, ke Esperanto kiel neŭtrala rimedo de internacia komunikado minacas neniel kaj nenies naciajn tradiciojn kaj fundamentajn kredojn. Samtempe ĝi konservas la diversecon kaj donas al ni eblecon krei en spirito de egaleco novan internacian ordon.

Tiu nova internacia ordo kuntenas, sed lasas esence liberaj, la diversajn kulturojn. Zamenhof diris 'tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian.' La lingvo Esperanto, nia nuna Kongreso, la granda internacia Esperanto-movado, ĉio ĉi estas vivanta pruvo pri tiu baza kredo. Ignori tion estas kvazaŭ ignori la ekzistorajton mem de la homa diverseco. Mi sugestas al Svedujo, ke pri tiu demando ĝi vekiĝu, ke la homaro pri tiu demando vekiĝu. La parolantoj de Esperanto venas inter vi kun simpla sed potenca mesaĝo: Lingva egaleco, lingva diverseco, lingva unueco — ne estas kontraŭdiroj, sed ili harmonias ĝuste en la spirito de la Internacia Lingvo Esperanto."

Tiuj potencaj — kaj kuraĝaj — vortoj de Tonkin, ferme de la Solena Inaŭguro, bele reeĥis en la marŝo "Vivu Esperanto", kiun por la 26a Universala Kongreso, en 1934 en Stokholmo, komponis la svedo Sam Rytberg. Tiu muzika peco, per kiu finiĝis la Inaŭguro, tra la jardekoj restis populara en Svedio kaj ankaŭ dum la kongresa semajno estis ludata ĉe la gardista interŝanĝo antaŭ la Reĝa Palaco en Stokholmo.



D-ro John C. Wells parolas en la Inaŭguro de la 65a UK

Foto: P. Peeraerts

INAŬGURA PAROLADO DE D-RO JOHN C. WELLS  
PRI LA KONGRESA ĈEFTIMO "DISKRIMINACIO":

## Sisteme maljusta konduto kontraŭ iu difinita homgrupo

NI KUNVENIS el multaj landoj por la 65a Universala Kongreso de Esperanto. Ni kunvenis por uzi la Internacian Lingvon, Esperanto. Kiel okazas regule en amaso da renkontiĝoj, kunvenoj, kongresoj kaj konferencoj, organizitaj aŭ ĉeestataj de esperantistoj, ni parolas Esperanton, ni aŭdas Esperanton, ni komprenas Esperanton. Tamen estas eraro, supozi ke ni kongresas en Stokholmo nur por diskuti pri Esperanto! Tion ni faros sendube . . . , ni okupiĝos pri la kutimaj organizaj demandoj de la Esperanto-movado . . . Kaj certe okazos la ĉiujara miraklo, per kiu la novaj esperantistoj, la homoj kiuj nur antaŭ kelkaj semajnoj aŭ kelkaj mo-

natoj komencis lerni la Internacian Lingvon, provos sian novan akiraĵon en la praktiko: ili trovos, ke la lingvo ne estas nura teoriaĵo, sed ke ĝi funkcias, ke ĝi ebligas al homoj kun plej diversaj gepatraj lingvoj, el plej diversaj mondopartoj, kunparoli kaj interkompreniĝi sur neŭtrala bazo kaj per neŭtrala lingvo.

Kaj jen la ligo al la ĉeftimo de nia 65a UK. Uzi neŭtralan lingvon signifas forigi lingvan diskriminacion. Ĝi signifas, ke ni rifuzas favori iujn naciajn lingvojn kaj malfavori aliajn. Ebligi tian justan traktadon de la demando pri lingvoj en internaciaj rilatoj estas baza celo de la Esperanto-movado. Uzante unu komunan

neŭtralan simplan lingvon, ni traktas egale kaj juste la diversajn etnajn lingvojn: ni evitas diskriminacii kontraŭ la parolantoj de tiu aŭ alia malgranda lingvo, ni evitas favori tiujn, kiuj parolas denaske tiun aŭ alian "grandan" lingvon. La demando pri lingva diskriminacio — diskriminacio surbaze de lingvo — estas kerna por la apogantoj de la Internacia Lingvo Esperanto.

Diskriminacio — jen temo aktuala. Laŭmoda vorto, laŭmoda koncepto, tamen malnova fenomeno. Certe ekzistis diskriminacio, kiel fakto, longe antaŭ ol kreiĝis la vorto "diskriminacio".

Kio ĝi estas? Jen unu el la demandoj, kiujn ni provos solvi en la daŭro de la nuna semajno. Skize kaj enkonduke, oni povas diri, ke diskriminacio estas **sisteme maljusta konduto kontraŭ iu difinita homgrupo**. Diskriminacii kontraŭ iu socia grupo estas rifuzi al ĝi rajtojn egalajn al tiuj, kiujn ĝuas aliaj sociaj grupoj. Se oni malpermesas al nigrulo uzi la saman aŭtobuson aŭ edukiĝi en la sama lernejo kiel blankulo, tio estas rasa diskriminacio. Se oni tiel aranĝas, ke la superaj postenoj en iu kompanio aŭ industria entrepreno estas okupataj de viroj, sed ke difinitaj mal-superaĵoj estas okupataj de virinoj, aŭ pli draste: se oni traktas la virinojn socie ne kiel individuojn sed kiel apartenaĵojn aŭ posedaĵojn de la viroj, tio estas kontraŭvirina diskriminacio. Se tiel okazas, ke la ŝtatanoj de iuj landoj estas prosperaj, havas sufiĉon por manĝi, havas loĝejon, vivas en (relativa) lukso, dum la anoj de aliaj ŝtatoj malprosperas, malsatas, loĝas mizere, ne konas lukson, tio estas rezulto de internacia ekonomia diskriminacio.

Ekzistas ankaŭ multaj aliaj specoj de diskriminacio. Ni ne povas, en unu mallonga semajno, trakti ilin ĉiujn. Sed ni donos almenaŭ iom da atento al kvar aliaj specoj de diskriminacio: nome, diskriminacio kontraŭ handikapitoj, inter kiuj la blinduloj; religia diskriminacio, t.e. diskriminacio kontraŭ difinita socia grupo pro ĝia religia aparteno; diskriminacio kontraŭ pliaĝuloj, t.e. diskriminacio surbaze de aĝo; kaj diskriminacio kontraŭ samseksemuloj — kontraŭ gejoj, kiel oni nun prefere diras — t.e. diskriminacio surbaze de seksa orientiĝo.

Kaj kio pri lingva diskriminacio? Ni ne starigis ĝin kiel apartan branĉon aŭ branĉeton de la kongresa temo. Ĝi ne estas branĉo, ĉar — se vi volas — ĝi estas la trunko de la arbo, la parto kiu kunligas ĉiujn branĉojn kaj branĉetojn, eĉ la parto kiu gvidas nin al la radikoj de diskriminacio, profunde kaŝitaj en la grundo de la socio kaj de la homa psiko. Du el la prelegoj de ISU okupiĝos specife pri la demando de lingva diskriminacio. Cetere ni atendas, ke ĉiu seminario reliefigu la lingvajn aspektojn de la respektiva diskriminacio, kiujn oni trovas ĉe ĉiu. Tiel, ekzemple, sub la rubriko "rasa-etna diskriminacio" ni certe notos ke la anoj de rasaj aŭ etnaj malplimultoj en plej diversaj landoj estas devigataj lerni kaj uzi la lingvon de la plimulto, sed ke la anoj de la plimulto ne estas devigataj lerni kaj uzi la lingvon de la minoritato. Sub la rubriko "kontraŭvirina diskriminacio" ni notos ankaŭ

la lingvan ignoron de virinoj, ekzemple per la uzo de la pronomo *li*, virgenra, por indiki homon sen aludo al sekso (foje ni diras *li* aŭ *ŝi*, sed preskaŭ neniam nur *ŝi*). Sub la rubriko "internacia ekonomia diskriminacio" ni notos certe la fakton, ke la ŝtatanoj de la Tria Mondo estas devigataj lerni eŭropan lingvon aŭ eŭropajn lingvojn, sed ke la anoj de ŝtatoj en Eŭropo nur tre malofte lernas afrikan aŭ azian lingvon; ke la ĝenerala popola opinio en Afriko kaj Azio alte taksas la anglan, la francan kaj aliajn eŭropajn lingvojn, dum la ĝenerala popola opinio en Eŭropo tute malestimas la lingvojn de aliaj kontinentoj, ofte eĉ ne konante la nomon de lingvo kun milionoj da parolantoj kaj uzante diskriminaciajn esprimojn kiel "dialekto" aŭ "ĵargono" por aludi al tiuj lingvoj.

Sed ekzistas ankaŭ pluraj ĝeneralaj, principaj demandoj. Jen nur kelkaj, kiujn ni volas diskuti kaj klopodi respondi. Ĉu diskriminacio estas esenca afero de la grupo, aŭ de la individuo? Ĉu diskriminacio estas nepre intenca, vola ago, aŭ ĝi povas okazi senintence, malgraŭvole? Kion ni diros pri la fenomeno kiun oni povus nomi "memdiskriminacio" (memsubpremo),

## KONGRESA ĈEFTEMO:

### Dum 30 laborhoroj

"DISKRIMINACIO" — la ĉeftemo de la 65a UK — estas tiel ĝenerala fenomeno kaj tiel vasta nocio, ke en Stokholmo necesis rezervi ĉ. 40 kongresajn salonojn, kie 300 ĝis 500 kongresanoj dum preskaŭ 30 laborhoroj okupiĝis pri la plej diversaj (sed ankoraŭ ne pri ĉiuj) aspektoj de la ĉeftemo. La tuton kunordigis d-ro R. Corsetti, kun helpo kaj partopreno de: L. Åberg, M. Andréasson, H. Bakker, W. Bormann, A. Brennan, P. Daŝgupto, L. Edsenius, A. Goodheir, P. de Graaf, L. Hoffmann, B. Moon, J. Pool, R. Triolle, J.C. Wells kaj pluraj aliaj. Okazis tuta deko da prelegoj pri la ĉeftemo. Tri apartaj seminarioj (trifoje po du horoj) traktis jenajn aspektojn de diskriminacio: rasa/etna, kontraŭvirina, ekonomia. En tri aliaj kunvenoj temis pri diskriminacio kontraŭ pliaĝuloj, surbaze de seksa orientiĝo, kontraŭ handikapuloj. Du ĝeneralaj kunvenoj dediĉiĝis al la ĉeftemo. La konversaciaj rondoj por nespertaj parolantoj (kvarfoje po 1,5 horoj) okupiĝis pri "Diskriminacio". Estis organizita aparta tuttaga ekskurso por interesitoj pri etnaj demandoj. Inter multaj svedoj ekstermovadaj, kiujn logis la aktualeco de la ĉeftemo, troviĝis Gunnilla Sterner, kiu reprezentis la svedan registaron en la kopenhaga virina konferenco de UN (en julio ĉi-jare), kaj tuj poste venis prelegi antaŭ la partoprenantoj de la 65a UK. Apartan prelegon faris ankaŭ Birgitta Wistrand, membro de la Honora Komitato kaj prezidanto de granda sveda virina asocio.

Oni planas, ke la materialoj el la stokholma pritrakto de la ĉeftemo aperu en formo de aparta libro.

per kiu diskriminaciata grupo apogas sian propran viktmecon? Ĉu estas juste apliki "inversan diskriminacion", per kiu oni donas malegale **favoran** trakton al grupo historie diskriminaciata? Kie limiĝas la maljusta diskriminacio? — ĉar supozeble ni ĉiuj konsentus, ke homo rajtas favori siajn proprajn infanojn pli ol tiujn de la najbaroj aŭ de nekonatoj: do ĉu same oni rajtas favori sian tutan familion, eĉ malproksiman? sian vilaĝon? sian amikaron? sian tutan socian grupon (etnon, tribon, nacion)? Se ne, kial ne? Kiel tio aplikiĝas al la fenomeno de migrado el unu ŝtato al alia? Ĉu ŝtatoj rajtas limigi la enmigradon de homoj el aliaj ŝtatoj, kaj se jes, je kia bazo? Ĉu prave ŝtato povas rifuzi al enmigrintoj egalajn rajtojn kun siaj propraj ŝtatanoj (mi pensas pri demandoj de edukado, lingvo, minimumaj salajroj, pri la rajto alkonduki edzon aŭ edzinon kaj infanojn, pri la rajto aĉeti domon aŭ bienon)? Kaj mi ne forgesas, ke en pluraj ŝtatoj la plimulto minacas la kulturen pluvivon de iu etno ĝuste per tio, ke geografie kaj demografie la plimulto ŝajnas inundi la teritorion de la minoritato. Kiel trovi ekvilibron de la konfliktigintaj rajtoj?

Analizinte ĉion, ni tamen devas fronti ankaŭ al la problemo: kiel plibonigi la situacion? Kiel forigi diskriminacion? Se ĝi ekzistis kaj ekzistas tra la tuta homa historio, ĉu ne estas vana utopio, nerealisma revo, supozi ke oni povas forigi ĝin? Mi estas konvinkita, ke oni povas — se ne forigi — almenaŭ mildigi ĝin. Mi apogas tiun konvinkigon, rigardante ekzemple al la evoluo de la interrasaj rilatoj en la eŭropa penskulturo de la nuna jarcento. En la jaro 1900 tre ĝenerala estis la kredo en Eŭropo kaj Ameriko, ke la blanka raso estas supera: ke la blankuloj estas dotitaj de Dio per



specialaj talentoj, kiujn ili devas uzi por la bono de la homaro, protektante kaj edukante la pli simplajn, pli primitivajn rasojn de la mondo. La nigrahaŭtuloj, la brunhaŭtuloj, la ruĝhaŭtuloj, la flavhaŭtuloj kompreneble ne estas **egalaj** al la blankhaŭtuloj (oni pensis), kaj kompreneble ne povas ĝui egalajn privilegiojn en la ŝtato kaj la socio; sed la eŭropano, la blankulo, edukos la neeŭropanon, la kolorhaŭtulon, ĝis li atingos civilizitan staton, ĝuste kiel patro edukas siajn gefilojn. Kiu nun pensas tiel? Aŭ, sekrete pensante tiel, aŭdacus tiel esprimi sian opinion? Niaj ideoj ŝanĝiĝis. Ni (kaj mi parolas kiel ano de tiu eŭropa, blankhaŭta gru-

po) komprenas nun, kiel eraraj estis tiuj antaŭaj ideoj. Ni vidas, ke rasa diskriminacio estas abomenaĵo. Ni kondamnas ĝin. (Survoje, ja, necesis teruraj militoj kun milionoj da mortoj: sed jes, ni certigis ke sistema, elpensita rasismo troviĝas en la mondo hodiaŭ nur ĉe politike ignorindaj marĝenaj grupetoj, kun la escepto de unu suda lando fifama pro tio tra la homaro: kaj ni memoru ke eĉ la sudafrika rasismo estas parte la sindefendo de minoritato, kiu perceptas sin kiel minacatan.)

Por reveni al la komenco de la nuna jarcento: kiam Zamenhof faris sian konatan deklaron pri la bona kaj malbona patriotismo, per kiu li atakis la ŝovinistojn, la semantojn de malamo; aŭ kiam li verkis sian naivan sed sinceran Memuaron por la Kongreso de Rasoj, li estis profeto, kiu eldiris ideojn tute ne ĝenerale subtenatajn. Novajn ideojn, utopiajn ideojn. Hodiaŭ tiuj liaj ideoj pri raso, pri la homa frateco inter ĉiuj gentoj, povas ŝajni banalaĵo. Tiuj ideoj eniris la komunan idearon, ili fariĝis akceptitaj ideoj, pri kiuj oni apenaŭ bezonas plu diskuti. Ni ĉiuj kondamnas rasismon. Ni ĉiuj estas kontraŭ rasa diskriminacio. Kaj sekve, certe malpliigi rasu diskriminacio. Vidu nur tion, kio okazis en Usono, kie antaŭ nur tridek jaroj nigruloj estis oficiale diskriminaciataj en la edukado. Eĉ se la praktiko ne ŝanĝiĝas tiel rapide kiel la teorio, almenaŭ oni sukcesis ŝanĝi la teorion, kaj ŝanĝi la juran pozicion, kaj ŝanĝi multilate la praktikon. Kaj tio okazis en mia propra vivo. Progreso ja povas okazi.

Zamenhof estas konata ne pro siaj ideoj pri rasa diskriminacio kaj intergentaj rilatoj, sed pro siaj ideoj pri lingva diskriminacio (kvankam li mem ne nomis ĝin tiel) kaj pri la ebleco solvi la mondan lingvo-problemon per simpla kaj neŭtrala idiomo, kiu estu lernata kiel dua lingvo de la tuta homaro. Ni kunvenis iel por festi tiun revolucion ideon. Sed ĝis nun la repensado de la ideoj pri interlingvaj rilatoj ne okazis en la komuna ideologio de la publiko aŭ de la intelektularo, kiel ja okazis repensado de la ideoj pri intergentaj rilatoj. La publiko internacia ne plu toleras diskriminacion kun rasa bazo; sed ĝi ja plu toleras diskriminacion kun lingva bazo.

Ni kunvenis por diskuti diskriminacion. Iuj el ni vidos ĝin tra kristana perspektivo, aliaj el ni tra marksisma, ankoraŭ aliaj tra la perspektivo humanisma (aŭ, kiel dirus Zamenhof, homaranisma). Tiel ni ĵetos diversajn kolorojn de lumo sur la problemojn, kiujn ni diskutos. Sed tio, kio distingas nin, la speciala karakterizo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto, estas tio, ke **ni ne toleras lingvan diskriminacion!** En neniuj alia kongreso de du mil personoj el pli ol kvindek landoj oni povas fieri, kiel ni, ke estas uzata unu komuna lingvo, kiu donas specialan avantaĝon al neniuj gepatralingva grupo, sed ebligas al ĉiuj egale kontribui al la kongresaj laboroj. Ni tiel pruvas la valoron de la Internacia Lingvo en la batalo kontraŭ lingva diskriminacio. Kaj ni tiel fortigas nin en la batalo kontraŭ ĉiuj aliaj specoj de diskriminacio.

John C. Wells

# Okazis promociiĝo: Prezidanto fariĝis simpla estrarano

SAME KIEL dum pluraj pasintaj jaroj, la "movada parto" de la Solena Inaŭguro havis en la programo apartan lokon kaj okazis la 3an de aŭgusto posttag-meze. Sub la prezido de prof. Carl Støp-Bowitz kaj la titolo "Malfermo", ĝi komenciĝis per fortepiafila preludo de Roland Dupuis. Laŭ la programo, devis sekvi salutoj de internaciaj neregistaraj organizaĵoj, sed montriĝis ke pluraj sendis siajn reprezentantojn al la matena parto de la Inaŭguro (Internacia Civila Servo, Monda Organizaĵo de la Skolta Movado, Kunordiga Komitato de Internacia Volontula Servo, Monda Ateista Konferenco). Oni legis specialan mesaĝon, kiun al la Kongreso sendis la mondfama norvega esploristo kaj verkisto Thor Heyerdahl (kies libro *Kon-Tiki* siatempe aperis en Esperanto). Tiu bela teksto de Heyerdahl enhavas i.a. jenajn frazojn:

"Ĉiu pacama kaj progresema persono devas ĝoje saluti ĉiun provon por kunigi la homaron kaj aligi la naciojn pli proksime unu al la alia. La Esperanto-movado havas tian progreseman programon. Neniu perdas sian gepatran lingvon aŭ la nacian suverenecon, se oni lernas universalan lingvon aldone al sia propra. En la tago, kiam la Oriento kaj Okcidento, Nordo kaj Sudo povos esprimi sin per la samaj vortoj, spontane malaperos senfinaj miskomprenoj kaj malĝustaj interpretoj, kaj ni spertos, ke kiam la lingvo ne apartigas nin, tiam estos malmulto alia kio tion faras."

La ĉefan parton de la malferma solenaĵo okupis parolado de Humphrey Tonkin. Tio ĉi estis la kunveno en kiu Tonkin unuafoje anoncis al la kongresanaro la elektiĝon de la nova prezidanto de UEA, s-ro Grégoire Maertens. Tio ĉi do estis ankaŭ la lasta granda kongresa aranĝo en kiu Tonkin aperis en la rolo de la prezidanto de UEA. Tamen, lia parolado estis trankvila, simpla kaj senpasia. Ĝi jam sonis, ne kiel parolado de la gvidanto, sed kiel publika elpaŝo de unu el la gvidantoj de UEA. Ĝuste tiu simpleco, tiu memkonscia atenco al la tra la jaroj tamen kreiginta kulto de Tonkin, tio estis la ĉefa kvalito de lia parolado, tio estis la tuja sukcesa provo roli kiel unu el la estraranoj, kaj ne plu kiel la ĉefa funkciulo de la Asocio. Kiel ni jam antaŭe diris en ĉi tiu revuo, tiu trankvila transdono de la prezida funkcio, kaj precipe tiu samtempa preteco de Tonkin en la sekvanta oficperiodo roli kiel "simpla" estrarano, tio estas evento senprecedenca ne nur en la Esperanto-movado sed ankaŭ en plimulto de aliaj organizaĵoj kaj movadoj. Ĉio ĉi donas gravan historian dimension al la sesjara prezidanteco de Tonkin en UEA. Ni estas ankoraŭ tro malmultnombraj por per-

mesi al ni la lukson ne lerni tiun grandan lecionon de Humphrey Tonkin.

Kion Tonkin fakte diris en tiu stokholma parolado? Li unue trankvile, iom nekohere kaj lace ŝajne, listigis la ĉefajn problemojn, kiujn la Asocio frontis dum liaj ses prezidaj jaroj. Jen ili:

— Financoj estis la ĉefa interna problemo de la Asocio antaŭ ses jaroj. Tiam oni interne de kvar monatoj sukcesis duonigi la prognoztan deficiton, kaj ekde 1975 finis ĉiun jaron kun pozitiva saldo en la spezkonto.

— Okazis tuta inversigo en la eksteraj rilatoj de la Asocio. "Tre ofte en la periodo antaŭ 1974 la Asocio trovis sin en pozicio de konfrontiĝo kontraŭ la aliaj organizaĵoj. Ni proteste forlasis salonojn, ni insistis pri difinitaj punktoj, ni kvazaŭ perforte klopodis forigi difinitajn lingvajn problemojn en tiuj organizaĵoj." Tonkin klarigis, ke oni poste celis unuavice trovi la komunajn terenojn kaj manierojn, kiel UEA povas helpi al la internaciaj organizaĵoj, kaj kiel tiuj organizaĵoj povas helpi al UEA. Kiel ni jam plurfoje atentigis en ĉi tiu

## Kongresa rezolucio

Universala Esperanto-Asocio, kunsidante en Stokholmo de la 1-a ĝis la 9a de aŭgusto 1980, dum la 65-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestas pli ol 1800 partoprenantoj el 51 landoj,

**notante**, ke la celoj de Unuiĝintaj Nacioj, laŭ la Artikolo 1 de ĝia Ĉarto, inkluzivas realigon de internacia kunlaborado "por solvi internaciajn problemojn de ekonomia, socia, kultura aŭ humaneca karaktero kaj por antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio", kaj ke similaj principoj animas la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj postajn internaciajn homrajtajn aktojn;

**memorigante** pri la agado de Unuiĝintaj Nacioj en la Jardeko de Luktado por Forigo de Ĉiuj Formoj de Rasismo kaj Rasa Diskriminacio, kaj pri la laboro de Universala Esperanto-Asocio en ties kadro, priskribita en la laborplano pri la Jardeko akceptita de la Asocio en 1974;

**memorigante** same pri la grava kontribuo de UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj al forigo de ĉiuj formoj de diskriminacio;

Foto: Z. Nikolov



**Trankvila transdono de la gvida funkcio en UEA: Tonkin kaj Maertens, la ĝisnuna kaj la nova prezidantoj**

revuo, tiu nova taktiko sur la kampo de la eksteraj rilatoj donis escepte bonajn rezultojn kaj kondukis al granda disfloro de la aktiveco sur ĉi tiu labortereno.

— Tonkin aparte emfazis la restrukturadon de UEA dum la pasintaj ses jaroj. Pligrandiĝis la rolo de la Komitato. "Tre ofte en la pasinteco la Komitato funkciis kvazaŭ stampilo de la laboro de la Estraro. Ni

klopodis ŝanĝi tiun rilaton, tiel ke la Estraro fariĝu la stampilo de la Komitato." Li emfazis, ke multo estis farita ankaŭ por laborigi la Komitaton pere de la komisionoj, kiuj nun funkcias en UEA. Tonkin memorigis pri la kreigo de la novaj UEA-oficejoj en Antverpeno kaj Nov-Jorko kaj pri la administra restrukturado tiurilata. Li plue diris: "Pri kelkaj aferoj ni ne faris fundamentajn ŝanĝojn. Ĉefe, ni ne faris fundamentajn ŝanĝojn pri la baza filozofio de la Asocio. . . Ekzistas iuj, kiuj disfamigas la supozon, ke UEA forlasis la neŭtralecon, unu fojon por ĉiam, ke ni nun iras laŭ iu glita vojo, kiu kondukas, mi ne scias, ĉu al la infero, ĉu al iu difinita ĉefurbo. . . Estas iuj, kiuj diras tion, sed mi sugestas, ke vi rigardu la tekstojn [de la Statuto] kaj ke vi rigardu la laboron. Mi kredas, ke vi ne trovos iujn ajn spurojn pri iu ajn ŝanĝo en tiu rilato."

— La kvara demando, kiun la Asocio frontis dum la pasintaj ses jaroj, estis, laŭ Tonkin, la repacigo de la Movado. Tiurilate li citis fragmenton el la kongresa parolado de Zamenhof, en 1911 en Antverpeno: "Esperanto ne estas ankoraŭ en tia feliĉa stato, ke ĉiu povu nur tiri el ĝi profiton, ne zorgante pri la bonstato de la afero mem: ni devas kaj dum longa tempo ankoraŭ devos propagandi ĝin, kreskigi ĝin, defendi ĝin kontraŭ malamikoj; sed se ni ne havas la eblon regule interkonsiliĝadi, aŭ se niaj interkonsiliĝoj, farataj ne en orda parlamenta maniero, ne havas moralan valoron por la esperantistoj, ni similos organismon sen kapo kaj sen manoj, ni nenion povos entrepreni, ni staros senmove kaj malpacos inter ni mem." Tonkin memorigis ankaŭ pri la zamenhofaj frazoj el Krakovo

**atentigante** pri la laboro de UN en la kadro de starigo de Nova Internacia Ekonomia Ordo kaj en kreado de amikaj rilatoj inter la popoloj bazitaj sur la respekto al la principo de egalaj rajtoj;

**konstatas, ke**

1. la problemo de diskriminacio surbaze de lingvo estas intime ligita al aliaj specoj de diskriminacio, kaj ke tiuj specoj de diskriminacio kutime havas siajn lingvajn dimensiojn;
2. tamen ankaŭ diskriminacio surbaze de lingvo estas klare distingebla kiel aparta problemo, kiu estas ofte konfuzata kun rasa/etna diskriminacio sed efektive havas siajn unikajn ecojn;
3. okazas lingva diskriminacio, se el du grupoj havantaj malsamajn proprajn lingvojn, la unua devas lerni kaj uzi la lingvon de la dua, dum la dua ne bezonas lerni la lingvon de la unua;
4. lingve diskriminaciataj povas esti ne nur lingvaj minoritatoj interne de la ŝtatoj, sed en monda kadro ankaŭ sendependaj nacioj kaj ŝtatoj;
5. lingvan diskriminacion praktikas tiu, kiu uzas sian propran lingvon por ĉiuj kontaktoj kun alilingvanoj, tiel devigante ilin uzi tiun lingvon;
6. lingvan diskriminacion suferas tiu, kiu estas devigata de alia popolo uzi ties propran lingvon en difinitaj sferoj de la vivo (ekzemple en edukado, en la profesio, en internaciaj kontaktoj);

7. lingva diskriminacio inter ŝtatoj ofte manifestiĝas en la interna lingva politiko de internaciaj organizoj, kiuj favoras iujn naciajn lingvojn kiel laborlingvojn (kaj sekve favoras iujn ŝtatojn super aliaj), tiel ekskluzivante aliajn lingvojn, ofte la lingvojn de la malpli fortaj popoloj kaj ŝtatoj;

**atentigas** pri la signifa rolo, kiun povas ludi la Internacia Lingvo Esperanto en la forigo de lingva diskriminacio kaj en starigo de kunlaboro inter ŝtatoj kaj popoloj en spirito de egaleco;

**atentigas**, ke en interna lingva politiko de internaciaj organizoj la utiligo de Esperanto prezentas nepre praktikan rimedon por forigi diskriminacion surbaze de lingvo kaj por faciligi egalecajn kontaktojn inter la diversaj ŝtatoj-membroj;

**alvokas** al la diversaj ŝtatoj kaj al internaciaj organizoj, ke ili serioze kaj science esploru la atingojn kaj potencialon de la Internacia Lingvo Esperanto kiel rimedo de internacia komunikiĝo cele al realigo de la principoj de la Ĉarto de UN, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliaj internaciaj aktoj.

**NOTO:** Krome, dum la Kongreso en Stokholmo, la Komitato de UEA akceptis kvar apartajn rezoluciojn, kiuj temas pri: la lingva problemo en la internaciaj organizaĵoj, kontraŭvirina diskriminacio, lingva problemo en la sporto kaj propono pri Esperanto en la Monda Konferenco de Turismo (sept. 1980).



(1912): "Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: 'kiu pli laŭte krias, tiu estas prava'. Per unueco ni pli aŭ malpli frue nepre venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune."

Tonkin prave atentigis, ke tiuj vortoj de Zamenhof "validas hodiaŭ, same kiel tiam, kaj validos ankaŭ morgaŭ kaj postmorgaŭ". Li diris, ke oni tiurilate klopodis ŝanĝi la tutan etoson en UEA. Tonkin aldonis: "Mi opinias, ke ni grandparte sukcesis. Estas unu, laŭ mi, malgranda pruvo pri tiu sukceso. Tio estis la komitata kunsido hieraŭ. . . Mi ne parolas nun pri la etoso en la kunsido, sed pri rezultoj. . . La Komitato tute bone, kaj tute trankvile, kaj tute sen problemoj, kaj tute laŭ procedura ordo, kaj tute kun interkonsento, elektis novan prezidanton. Tiel finiĝas do mia periodo, periodo kiu laŭ mi estis iasence transira, kaj ni nun eniras novan periodon, kun nova prezidanto." Tonkin ja pravas kiam li elstarigas tiun komitatan kunsidon en kiu elektigis la nova prezidanto, por tiel trafe ilustri la ŝanĝon en la movada etoso. Aliflanke, Tonkin malpravas, kiam li nomas sian prezidan periodon nur "transira", ĉar tiu periodo efektive estis mejloŝtona kaj ĝi sendube ankaŭ en la estontaj jaroj profitigos la Movadon per la historia graveco de tiu transiro al pli sana kaj pli harmonia funkciado de la internacia Esperanto-movado kaj precipe de UEA mem. Fine de sia parolado Tonkin reemfazis kelkajn prioritatojn en la estonta laboro de UEA kaj, tute simple kaj senpatose, komunikis, ke li ĉesas esti prezidanto por resti kaj pluaktivi en la Asocio kaj en la Movado (li poste elektigis en la novan Estraron).

Ni emas aparte emfazi du vortojn, kiuj karakterizis ĉi tiun paroladon de Tonkin. La samaj du vortoj enestis, ni kredas, ĉiujn publikajn elpaŝojn de Tonkin kiel gvida figuro en la internacia Esperanto-movado dum la lastaj ses jaroj. Tiuj du vortoj trafe karakterizas la tutan prezidantecon de Tonkin kaj resumas la ĉefan movadan valoron de tiuj ses jaroj. "Ni" estas la unua

el tiuj vortoj. En ĉiuj frazoj de Tonkin tiu "ni" anstataŭis la iaman "Mi". Kaj pri la dua vorto: Ankaŭ ĉi tiu malferma parolado de Tonkin komenciĝis per "Karaj gekolegoj". Tiel li komencis ankaŭ siajn elpaŝojn en pluraj antaŭaj kongresoj. Ni ofte (nun estas la momento por konfesi la pekon!) forredaktis tiun "gekolegoj", kredante la esprimon nepreciza kaj neadekvata, ĉar malmultaj movadanoj estas specialistoj pri la renesanca angla literaturo, kion Tonkin instruas en Filadelfio kaj Nov-Jorko. Nun tiu persisto de Tonkin pri la "kolegeco" instigas nin pensi, ke tiu homo intence kaj prave forgesis sian ekstermovadan fakon kaj en la Movado mem traktis ĉiujn aliajn kiel gekolegojn, kiuj okupiĝas pri la sama laboro, por la sama celo. Tiu eta semantika kontribuo de Tonkin al la signifo de la vorto "gekolegoj" kaŝas en si la tutan grandecon de lia kontribuo al la necesa demokratigo de la homaj rilatoj en la Esperantomovado. Tial ankaŭ "La Espero", kantita en la fino de ĉi tiu kongresa kunveno, sonis al ni nove, precipe tiuj versoj "Nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos. . .".

sm

## LA KOMITATO KAJ ESTRARO:

# Ŝanĝoj kaj kontinueco

UEA kreskas. Denove unu landa asocio — la 43a — aldoniĝis al la listo de tiuj aliĝintaj al UEA. Tio signifas, ke en la ses jaroj de la du lastaj estraroj entute dek pliaj landaj asocioj aliĝis. Ĉi-foje temas pri organizaĵo, kiu tuj alportis 1 124 pliajn membrojn kaj kiu jam tre pozitive kunlaboras sur pluraj kampoj: Ĉina Esperanto-Ligo. Ĝian aliĝpeton akceptis la Komitato de UEA en Stokholmo.

La novaj ĉinaj komitatanoj — Zhang Qicheng kaj Ye Junjian — ne estas la solaj novaj vizaĝoj en la supera gvid-organo de UEA. La jaro 1980 estas elektojararo. Tio signifas, principe, ke ĉiuj oficantoj en la Asocio estas ŝanĝeblaj ĉi-jare, ekde fakdelegito pri fungoj ĝis la prezidanto mem. Ni faru liston de ĉiuj aliaj novaj komitatanoj, kiuj dum la venontaj tri jaroj havos la superan respondecon pri la aferoj de UEA. Jen ili: A.H. García Breque, E. Majtanić, L. Dreze, E. Symoens, C.A. Siqueira da Cunha, D.S. Papazov, Z. Křimský, P. Bagger, G. Migas, L. Hernández García, E. Barát, I. Pethes, W.G. du Temple, B. Moon, N. Utne, E.E. Kuligowska, F.D. Costa, R. Lindblom, M. Andréasson, F. Cool-Côté, I. Gulyás, B. Casini (komitatanoj A); W. De Smet, F. García Blázquez, O. Haszpra (komitatanoj B); V. Benczik, U.J. Moritz, H. Kindler, B. Ragnarsson, W. Pilger (komitatanoj C); C. Mallia, J. Mosonyi (observantoj). En tiu bunta nomaro kaŝiĝas la esperoj pri pli efika agado en la ve-

nonta laborperiodo. Iom da statistiko: la Komitato nun konsistas el 85 homoj en 39 landoj.

Krom la nova Statuto, kiu ekvalidis ĉi-jare, UEA nun havas ankaŭ novan regularon pri elektoj, interalie por la elekto de la Estraro. Malkonsentoj pri la ĝusta maniero elekti la Estraron iam malŝparis valorajn horojn en komitataj kunsidoj. La akcepto de klara regularo, bazita sur la tradicia praktiko, simpligis la tuton, tiel ke la elekto de nova prezidanto povis okazi jam en la unuaj tagoj de la Kongreso, eĉ ĝustatempe por anonci tion en la Inaŭguro! La elekto trafis la iniciateman estraron pri financo kaj administrado, s-ron Grégoire Maertens. Laŭ la nova Statuto de UEA, prezidanto oficas maksimume ses jarojn. Ĝuste tiun reformon postulis Humphrey Tonkin, la antaŭa prezidanto. Tonkin estis tamen reelektita kiel "simpla" estrarano (cetere kun la plej alta nombro de voĉoj) kaj parte daŭrigos la ĝisnunan laboron.

En la lasta elekto-jaro, 1977, precize duono de la Estraro estis renovigita. Nun okazis same: el la ok estraranoj por la periodo 1980-83, kvar estas novaj: Renato Corsetti (Italujo), Eliza Kehlet (Belgujo), Baldur Ragnarsson (Islando), kaj Petăr Todorov (Bulgarujo). Restas Grattapaglia, Maertens, Szabó-Felső kaj Tonkin el la malnova teamo, por certigi la kontinuecon de la laboroj. Ĉio ĉi signifas, kompreneble, ke retiriĝis el la Estraro Auld, Bormann, Pettyn kaj Støp-Bowitz, kvankam la tri laste menciitaj restas komitatoj. Krome, al prof. Støp-Bowitz estas asignita la titolo "Komisiito pri specialaj taskoj" — belnomo, kiu signifas proksimume "movadan fajrobrigadiston", t.e. la homon, kiu diplomate kaj pacige intervenas, se ie ekestas gravaj malakordoj.

Foto: Z. Nikolov



La oficialan disdividon de la taskoj inter la novaj estraranoj vi povas legi sur la interna kovrilpaĝo. Maertens, krom prezidi la Asocion, plue gvidos la Komisionon pri Financo kaj Administrado kaj respondecos pri tiu fako. Corsetti transprenas landan kaj regionan agadon el la manoj de Grattapaglia, en kies komisiono li trejniĝis dum la lastaj jaroj. Ŝi, siavice, akceptis respondeci pri informado kaj la delegitaro. Ragnarsson, poeto kaj

Foto: P. Peeraerts



prezidanto de la Belartaj Konkursoj, logike ŝargiĝis per la kampo "kulturo", kiun antaŭe prifosis Tonkin. Szabó-Felső transdonis al sia posteulo Kehlet ne nur kongresojn sed ankaŭ la respondecon pri virina agado. Ŝi mem estonte ĝeneral-sekretario kun aparta atento al planado. Todorov, inĝeniero laŭ profesio, respondecos pri faka agado, kio unuavice signifas sciencan kaj teknikon. Fine, Tonkin transprenas, krom la eksteraj rilatoj (kiujn li tiel sukcese gvidas jam de ses jaroj), ankaŭ la kampojn de esploroj kaj edukado.

Ne ĉiuj elektoj estas tiel laborigaj. La Komitato decidis ankaŭ honorii plurajn figurojn de la Movado per elekto jen al la Honora Patrona Komitato, jen al honora membreco de UEA. La Honora Patrona Komitato konsistas el personoj eminentaj en sia ekstermovada vivo, kiuj faris krome signifajn servojn al la Esperantomovado. Al ĝiaj ĝisnunaj 7 membroj aldoniĝas la plantatologo Paul Neergaard (Danlando) kaj la antropologo Tadao Umesao (Japanujo). Novaj honoraj membroj de UEA estas Eŭgeno Aisberg (Francujo), Nikola Aleksiev (Bulgarujo), Arthur Baur (Svislando), Pol Denoël (Belgujo), Carlita Hueter (Francujo), Irja Klemola (Finnlando), Lajos Kökény (Hungarujo) kaj Betty Salt (Kanado).

Du novaj regularoj rezultis el la laboroj de la Komitato: pri Internacia Kongresa Universitato kaj pri popularscienca eldonserio. Kvankam la kreado de regularoj en si mem ne estas produkta laboro, ĝi ofte multe faciligas aŭ akcelas la produktan laboron mem. Espereble tio validos por la regularo pri popularscienca eldonserio. Kvankam jam de longe aŭdiĝis, ke UEA devus iniciati popularsciencan libroserion, analoge al la jam ekzistanta belliteratura serio "Oriento-Okcidento", ĝis nun "ĉio restis penso sed ne faro". Nun almenaŭ ekzistas klara kadro por tiu iniciato. Pli grave, la negocoj pri starigo de nova oficejo de UEA en Budapeŝto, kun specifa tasko antaŭenigi la scienc-teknikan aplikadon de Esperanto, jam tre proksimas al interkonsento. Lige al tio, ankaŭ la Internacia Kongresa Universitato (antaŭe nomita Internacia Somera Universitato, sed

okazonta venontjare en la brazila vintro!) povos nun, kun pli praktika regularo, ludi ĉiam pli gravan rolon. Kiel pasintjare, la Komitato grandparte laboris en komisionoj (nun rekonsistigitaj por la venonta laborperiodo) dum la Kongreso. Tiuj komisionoj kune produktis ĉirkaŭ 50 paĝojn da raportoj, protokoloj kaj proponoj, kiujn la Komitato poste pritraktis kaj kiuj nun grandparte servos kiel gvidlinioj al la nova Estraro kaj ĝiaj komisiitoj. Inter amaso da ideoj, jen kelkaj pli okulfrapaj: starigo de plia oficejo de UEA,

povus havi avantaĝojn ekz. por varbado de subvencioj de eksteraj fontoj.

Malantaŭ la nuda fakto, ke la Komitato akceptis preskaŭ unuanime la kontojn de la Asocio por 1979, la kontojn de Varna kaj Lucerno kaj la buĝeton por 1981, kaŝiĝas granda kvanto da laboro en la Komisiono pri Financo kaj Administrado. La buĝeton (aperontan en la venonta numero de *Esperanto*) karakterizas unuflanke severaj ŝparoj kaj aliflanke ĝenerala altigo de la kotizoj je ĉ. 10%. Ĉar pasis jam tri jaroj de post la



**Redistribuo de la taskoj: d-ro V. Sadler, ĝenerala direktoro de UEA; S. MacGill, direktoro de la CO en Roterdamo; J. McAloon, direktorino de la Nov-Jorka Oficejo; P. Peeraerts, direktoro de la Grafika Centro de UEA en Antverpeno**

ĉi-foje speciale por turismo; organizo de landaj kampoj por enigi elektitajn librojn pri Esperanto en la nacilingvajn vendejojn; rekonsideri la celojn kaj funkciadon de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). La nova, pli ampleksa estraro de CED (Blanke, Daŝgupto, Frank, Golden, Lins, Pennacchietti, Pool, Sherwood kaj Tonkin) havas la taskon i.a. ellabori proponon por la laŭjura kaj laŭstupa sendependigo de CED disde UEA. Tio

lasta ĝenerala altigo (ankaŭ tiam temis pri 10%), tio signifas, ke meze ni devis postuli de la membroj nur iom pli ol 3% pli ĉiujare. Tio estas vere modesta cifero, se kompari ĝin kun la meza inflacio de ĉiu ajn lando de la mondo.

Atenta planado kaj buĝetado estas aparte grava en periodo de rapida disvolvo de la agado. Ĝuste nun UEA troviĝas en tia periodo, kiam ĝi jam malfermis du novajn oficejojn (Antverpeno kaj Nov-Jorko), trāk-

## ĜENERALAJ KUNSIDOJ:

# Recenzo de la Estrara Raporto

UNUAFOJE en multaj jaroj, la Unua Ĝenerala Kunsido de UEA montriĝis en Stokholmo multe pli interesa ol la Dua Ĝenerala Kunsido, kiu ankaŭ en la 65a UK okupiĝis pri la kongresa ĉeftemo. La subita vigeleco de la Unua Ĝenerala Kunsido ne ŝuldiĝis al novaj tagordo kaj temo, ĉar ankaŭ en Stokholmo la sola traktendaĵo estis la Estrara Raporto 1979/80. La kunsidon animis realiĝo de estrara ideo, ke pri la raporto ne parolu nur la ĝenerala sekretario de UEA, sed ke oni trovu recenzanton, kiu juĝu la raporton senpartie, de ekstere. Tiu sukcesa recenzanto en Stokholmo estis s-ro Wouter F. Pilger, iama aganto en TEJO, movada eldonisto, aktivulo en la Komisiono pri Kulturo kaj — post tiu stokholma recenzo — ankaŭ komitatano de UEA.

Pilger starigis multajn demandojn al la Estraro. Ni klopodu listigi la plej gravajn: Kial en la raporto listiĝas agadoj, kiuj ne apartenas al la iniciatoj de UEA? Kion oni faras pri la modernigo de la Delegita Reto, krom la daŭran ripetadon, ke la modernigo necesas? Se la Kongresoj alportas profiton, kial la kongreskotizoj restas tiel altaj? Kion UEA faras por produkti Esperanto-lernilojn en la afrikaj lingvoj? Kial oni ne iniciatu periodaĵon por komencantoj aldone al la nuna revuo de UEA? Kiuj estas la nunaj esplorprojektoj de CED? Kion faris UEA pasintjare sur la eldona kampo? Kie estas la aktuala laborplano de la Asocio?

Estraranoj klopodis respondi al la demandoj de la recenzanto. Pluraj respondoj klarigis la nunan situacion, sed pluraj demandoj ne ricevis kontentigajn respondojn (ekzemple, tiuj pri delegitoj, kongreskotizoj, lerniloj kaj laborplano). Supozeble, la nova Estraro revenos al la notoj pri ĉi tiu kunveno kaj plutraktos la starigitajn demandojn. Ankaŭ la multnombra publiko, kiu estis en la kunveno, levis plurajn aldonajn demandojn. Ĝenerala konkludo estas, ke necesas daŭrigi ĉi tian pritrakton de la laboro de UEA en similaj kunvenoj dum la venontaj Kongresoj.

tas pri tria (Budapeŝto) kaj sondas pri pluraj aliaj tiaj eblecoj. Precipe la eldona agado kaj la eksteraj rilatoj troviĝas sur la sojlo de vere salta kresko. Pro tio la Estraro uzis la novan eblecon, kiun kreis la nova Statuto, nomante la ĝisnunan direktoron de la Centra Oficejo, d-ro Sadler, ĝenerala direktoro. En tiu ofico li havas la taskon ĝenerale kontroli ĉiujn oficejojn de la Asocio kaj plibonigi la financon planadon. Krome, li kunlaboras kun la ĵus dungita programisto, Ole Hagemann (Danlando), en la planado de la aŭtomatigo de la administrado. (La buĝeto antaŭvida aĉetonte de komputilo en 1981.)

Ekde la 1-a de aŭgusto la Centra Oficejo havas novan direktoron. Tiu estas la ĝisnuna prezidanto de TEJO, la 31-jara novzelandano Stefan MacGill. Kiam la direktorajn taskojn transprenas ĵusa funkciulo de nia junulara sekcio, oni povas paroli pri "generacia ŝanĝo" ne nur en senco aĝstatistika. MacGill alportas al sia nova ofico multajn ideojn pri membrovarbado, pri reorientigo de UEA favore al la novaj kaj pli junaj membroj, pri pli bonaj kontaktoj inter la centraj organoj kaj la vasta membraro. Cetere, kun tiaj reunigaj ideoj jam bone konformas la nova UEA-estraro, kies meza aĝo estas nur 42 jaroj. . . Fine, kiel nova redaktoro de la Jarlibro (anstataŭ MacGill) estas nomita Anna Brennan, kiu venis al la Centra Oficejo en 1977. La nova Estraro kunsidos denove en Rotterdam de la 12a ĝis la 14a de decembro 1980.

V. Sadler

## INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO, ĈEFTEMAJ PRELEGOJ, ESPERANTOLOGIA KONFERENCO:

### Abundo kaj kvalito

EN LA 32a sesio de Internacia Somera Universitato, d-ro W. Bormann prelegis pri "Diskriminacio pro hejmlando", traktante la demandon pri la malfacilaĵoj kiuj venas de ŝtataneco en la Tria Mondo, aŭ tutsimple en socie, geografie malfavorata situacio. La prozan poemon kaj ĝian aplikon en la Esperanta literaturo pritraktis en sia prelego la islanda verkisto Baldur Ragnarsson. Li esploris i.a. ĝian teorion difinon kaj ĝiajn rilatojn kun similaj formoj, kiaj la liberversa poezio kaj la figura prozo. Bojka Georgieva Batalaska parolis pri la proteinoj de maizo, en ligo kun la nesufiĉo de nutraĵoj en la nuna momento.

Anstataŭ prof. S. Kawamura (kiu estis malhelpita veni), prelegis prof. Richard E. Wood pri "Lingvo-politiko sur la poŝtmarkoj en la mondo". Ye Junjian, verkisto en la ĉina kaj Esperanto (pseŭdonimo: Cicio Mar), informis pri "La karaktero de la moderna ĉina literaturo", kun aparta pritrakto de la "Nova Kultura Movado" en la komenco de la dudekaj jaroj de ĉi tiu jarcento. Zoologian prelegon pri "Abundoj kaj mala-

bundoj de fokoj" la kongresanoj povis aŭskulti de d-ro Wim M.A. De Smet.

Iel rilata al la kongrestemo "Diskriminacio" estis la prelego de prof. H. Tonkin pri "Juĝo kaj antaŭjuĝo en *Otelo* de Shakespeare", kiu pritraktis la subtilajn psikologiajn esplorojn de Shakespeare en tiu dramo kaj la situon de *Otelo* inter aliaj dramoj de tiu verkisto. D-ro Béla Mészáros parolis pri "Kelkaj demandoj pri la orientado, migrado kaj navigado de birdoj", kaj esploris la mekanismojn, kiuj permesas al birdoj sinorientadon en la laŭklimata migrado.



En la foresto de prof. Björn Collinder (rektoro), la 32an sesion de Internacia Somera Universitato gvidis la vicrektoro, d-ro Ebbe Vilborg (sur la foto).

La kongrestemon eksplicite aludis la prelego de prof. Magomet I. Isaev. Ĝi temis pri "La soveta sperto en la likvido de la socia-kultura diskriminacio". La preleganto elmetis sian pritakson de la sovetaj postrevoluciaj reformoj en ligo kun la forigo de la car-tempa diskriminacio. Arkitekto Andrzej Rzymkowski parolis pri "Analizo de vilaĝaj arkitekturoj kiel pruvido pri egaleco de etnaj kulturoj", kun la celo demonstri, ke ĉiu popolo havas samajn kreivajn eblecojn, sed malsame evoluas pro geografiaj kialoj. La ĉi-jara prelego de prof. Carl Støp-Bowitz havis kiel temon la karakterizojn de la "Koralrifoj tropikaj kaj arktaj".

Kvar bone vizititaj prelegoj okazis ekster la kadro de ISU. Ili ĉiuj rekte koncernis la kongresan ĉeftemon. D-ro J.C. Wells parolis pri "Lingva diskriminacio"; prof. J. Pool prelegis pri "Lingva egaleco, lingva malleco kaj lingva diskriminacio: problemoj de konceptado kaj mezurado"; d-ro P. Daŝgupto lekcis pri la temo "Lingva ignoro de virinoj: vorta kaj maniera", dum d-ro A. Goodheir traktis pri "Religia toleremo kaj maltoleremo".

En la 3a Esperantologia Konferenco, d-ro D. Blanke parolis pri "Esploroj pri la sociaj aspektoj de Esperanto kaj ĝia parolantaro"; d-ro J. Jermaŝ titolis sian prelegon "Nacia kaj internacia kulturo — nacia kaj internacia lingvo". M. Gjivoje prelegis pri "Sociologiaj analizoj pri la strukturo de la nuntempa E-movado"; kaj d-ro J. Pool okupiĝis pri "La ekonomiaj avantaĝoj de planlingvo: decidteoria perspektivo".

Resume: 11 prelegoj en ISU, 4 prelegoj pri la ĉeftemo kaj 4 prelegoj en la Esperantologia Konferenco, eĉ tio ne estas la tuto de la okazinta prelegaro en Stokholmo. La abundon akompanis ankaŭ la kvalito de la prelegoj, sed ĉio kune iom grave superis la fizikajn eblojn de la publiko.

## TEATRO:

# Ekstreme vorta teatro

POST ekskursoplana tago, homoj ĝenerale soifas iom pli intelektan, pensmovan vesperon. Eble tial ili merkrede plenigis la ĉefan salonon de la kongresejo por spekti unuaktaĵon de K. Choliński, pol-usona aŭtoro, prezentitan de Pola Esperanto-Teatro. La titolo estis *Malfermu la pordon*, kaj la du rolojn ludis Kalina Pieńkiewicz kaj Zbigniew Dobrzyński.

Prezente, la kongresa libro asertis, ke la programero "helpas al bonhumoro", sed montriĝis male, ke ĝi proponas tute dramecan situacion. La aŭtoro fakte priondis la krizon de geedza paro, kies filino mortigis sin pro la nekomprene fare de la gepatroj. En ununura, tre longa sceno oni tradebatis la psikologiajn kaj etikajn problemojn de la paro, montrante la alklimakson de ilia konsciigo pri siaj kulpoj kaj devoj. Tiel ekstremisme "vorta" teatro riskis stagnigi la scenejan situacion. La spektanto neniam ĝuis la plezuron konstat, ke io vere okazas sursceneje, kaj ke oni ne nur rakontas pri io okazinta. Aliflanke, la intereson de la spektanto kaptis la introspektaj konsideroj pri tiu neniam malaktuala problemo, la reciproka nekomprene inter malsamaj generacioj.

Estas tamen domaĝe, ke oni emis preteratenti ĝuste la plej "teatrecajn" aspektojn de la prezento: oni subtaksis la gestadon, kiu estis iom uniforma. Ĝenerale la aktorado estis tro koncentrita je la enhavo de la teksto, kaj forgesis ekspluati la scenejajn eblecojn. Ankaŭ la kostumoj estis iom senfantazie elektitaj, kaj ne aparte stimulis la kreadon de ia etoso ĉirkaŭ la scenejaj okazaĵoj.

Ĉi-lastaj estis tamen tre bone kompreneblaj, dank' al la profesieca elparolo de la du rolantoj, kiu kapablis atingi eĉ la plej fundajn angulojn de la salonego. La Pola Esperanto-Teatro sukcesis tiel peri la konkretan, sed mankis al ĝi iom da kreiva garnemo.

Oni cetere demandas sin, kial la teatraj trupoj por la kongresoj tiel ofte elektas verkojn de preskaŭ nekonaĵaj aŭtoroj, montrante malfidon je sia forto kaj kapablo sursceneje regi laboron de iu klasikulo aŭ profesie prezenti originalaĵon de Esperanta aŭtoro.

M.N.

## Kapablo ornami

KIAM oni iniciatas gravan ŝanĝon en tradicia programero, la kongresanoj emas tion iugrade preteratenti aŭ rekte malaprobi. Tio tamen ne efektiviĝis okaze de la prezento de la Drama Sekcio de la Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo, kiu aldoniĝis al la anonco de la rezultoj de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj.

La zagreba trupo adekvate prezentis al kelkcenta spektantaro la premiitan drameton de Bernard Golden *Saluto al paradizo*. En ĝi la tradukista grupo de futurŝtata cenzurejo strebas al interpretado de supozitaj

kaŝaludoj en Esperanta poemo. La vera surprizo de ĉi tiu prezento estis tamen la erupcia kapablo de la trupo ornami la iom senpretendan tekston per diversspecaj gagoj kaj teatraj inventaĵoj, per kantoj (mem verkitaj de la trupo) kaj per simpla, sed efektiva sceneja aparato. La reĝisoro kaj ĉefrolanto Mladen Šerment ja montriĝis perfekta kaj sprita deklamanto, kies vortoj senmanke atingis ĉies orelojn kaj certigis brilan komikan efekton. Apartan signifon havas la fakto, ke la prezentita verko ricevis premion en la Belartaj Konkursoj. En la praktiko, teatraĵo ne ekzistas ĝis efektiva surscenejigo; kaj en tiu senco ni ankoraŭ posedas en la tirkesto de la Belartaj Konkursoj amason da neekzistantaj verkoj, kiuj atendas reĝisoron por eniri en la realon. En tia situacio, oni ja komprenas, ke la ĉiujara premiado de neniam aktorataj verkoj estas nura monmalŝparo flanke de UEA, kaj ke tiel la Belartaj Konkursoj ne plenumas sian celon, kiu konsistas en la progresigo de belarto en la koncernaj fakoj. Tial la ĉi-jara iniciato povus signifi komencon de efektiva agado cele al antaŭenigo de la originala Esperanta teatro.

Mauro Nervi

## Spektantoj kunaŭtoris

VASTAN PUBLIKON kaj la tutan Infanan Kongreseton entuziasmigis la pola Pupteatro de Rabka per la prezentaĵo *Muzikanto Zvirtala* de J. Wilkowski, kiu gajnis la unuan premion en la pasintjara Pupteatra Internacia Festivalo en Zagrebo.

Foto: Z. Nikolov



*Muzikanto Zvirtala* rakontas simple kaj priopole, kun forta desegno de herooj, fiuloj kaj ordinaraj homoj. Sed la prezento estas moderne sprita kaj neta. Kie la pupteatrantoj improvizas lude, aŭ pro arta bontrovo disiras de senĉifa formo-perfekteco, ili plene kuntiras la spektantojn kun si. Ili sukcesas sentigi, ke la spektantoj per sia reag-maniero kunaŭtoras la teatran prezenton. Tiel, tute leĝere kaj sen ŝajno instrui, ili konstatigas al ni — al la movada publiko, tiel infanoj kiel plenkreskuloj — ke jam spontane ni estas sufiĉe ludemaj kaj kreemaj por partopreni en tia bonegaĵo. Kaj tio pli valoras, ol mil prelegoj por la edifo de esperantistoj pri la specifeco de la moderna teatra arto.

P.D.

## Ne laŭplana, sed ĝuinda vespero

"VESPERAJ allogaĵoj" trumpetis la Kongresa Libro; en posta alineo ĝi fajfis pri la Internacia Vespero kiu "estas, laŭ kutimo, ĉefe vespero de muziko. Ĉi-jare ĝi havos laŭplane pli homogenan karakteron..."

Kongreslibra tamburado tiam pretigis nin por sesmembra orkestro el Pollando (ĝi ne aperis) kaj ekscitis nin pri la jam konata Gianfranco Molle el Italujo, ĉar "oni atendas novajn kantojn de li". Oni ankoraŭ atendas.

Verŝajne la neapero de tiuj du programeroj ne efikis sur la homogena karaktero de la vespero, ĉar ilin anstataŭis aliaj bonaj eroj. La ĉeftamburisto de la vespero, la afabla prezentisto Harri Melasniemi (Finnlando), forgesis tiom ofte siajn bastonetojn, ke li malkapablis memori, kiun li volas prezenti. Kompense, li rakontis interprezentajn ŝercojn, kies efiko estis dezirigi nin vidi la venontan artiston, eĉ se ni ne sciis ties nomon.

Por substreki la gravecon de la prezentado, ĉarme malfermis la vesperon Janet Enghardt (Svedujo), kiu prezentis al ni la prezentiston, kaj mi komencis demandi al mi, kiu sekvos en tia vico. La respondo estis la egale ĉarma Bożena Zborowska (Pollando), kiu kantis ambician areton da operetaĵoj per bela, profesia sed, mi timis, kelkfoje tro streĉita voĉo. Granda plezuro reaŭdi ŝin.

Same pri la baritono, Veselin Damjanov (Bulgarujo), kies vigla, forta kantado ĉiam altiras ĝeneralan aprobon. Tiu ĉi vespero estis por li, kiel por aliaj, muzika aperitivo antaŭ postaj recitaloj dum la semajno.

Sekvis la treege talenta, kvankam tre juna, pianisto, Geert Dehoux (Belgujo), kiu decidis eviti la stereotipajn klasikaĵojn favore al Skrbabin. Tiu elekto (kvankam brile ludita) kompreneble ne plaĉis al la pli konservativemaj ĉeestantoj, kiuj kelkloke montris sian malaprobos en sufiĉe diskriminacia maniero. Ŝajnas, ke ili opiniis, ke estus pli bone klopodi dronigi la pianoludadon per manfrapa bruaĉo ol akcepti silente, ke ne ĉiuj havas samajn gustojn. Sendube ĉe la fino de la semajno, post tiom da diskutoj pri diskriminacio ili sukcesis percepti sian eraron!

Tiaj homoj silentis tamen, por aŭskulti la diversajn flutojn paŝtistajn de Zuzanna Kawulok (Pollando). Ŝi ne nur tre bone ludis aŭ, minimume, sonigis dekon da flutoj, fajfiloj kaj montaranaj kornoj, sed ŝi ankaŭ amuzis nin per diversaj rakontoj kaj sinprezentado en nacia kostumo, kiu inkluzivis ŝtrumpojn ruĝajn kaj longajn 1,5 metrojn! Ritma aplaŭdego certigis bison.

La vesperon finis du pliaj kantistoj. Maria Angelova (Bulgarujo) ofertis al ni tri kantojn el kiuj la lasta (bulgara lulkanto) plej konvenis por la iom limigita esprimovo de ŝia voĉo. Male, Hans Lindén (Svedujo) pruvis forta, multkolora basoj, kiu bonege prikomentis la enhavon de siaj kantoj.

Gratulante ĉiujn kontribuintojn pro bonkvalita kaj ĝuinda vespero, mi aparte menciis la akompaniston, Anders Wadenberg (Svedujo), sen kies pianoludado la kantistoj estus kvazaŭ dupiedaj seĝoj.

Diccon Masterman

## Ses koncertoj

SVEDA VESPERO proponis abundan varion de popoldancoj, kantoj, renesanca kaj eĉ avangarda muziko. Tiu lasta speco estis komponaĵo de la sveda esperantistino, profesia komponisto, Dorcas Norre. Veselin Damjanov solkoncertis denove por sia jam multnom-

### BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1980:

## Premio por romano

Konkursis entute 106 verkoj (romano 10, poezio 45, novelo 19, teatraĵo 7, eseo 6, porinfana literaturo 8, fotografio 11), el kiuj la juĝkomisiono premiis jenajn: ROMANO (Premio Raymond Schwartz): Éva Tófalvi (Hungario) kaj Oldřich Kníchal (Ĉeĥoslovakio) pro *Kiuj semas plorante*.

POEZIO: Unua premio: Masayuki Kuroda (Japanio) pro *Malice kontraste*; Dua premio: Ladislav Podmele (Ĉeĥoslovakio) pro *Eternaj revuloj*; Tria premio: Mauro Nervi (Italio) pro *Nokta silento*. Laŭdaj mencioj: Aurel Boia (Rumanio) pro *Por kio, homoj, vivo nia?* kaj Mauro Nervi (Italio) pro *Rememore*.

PROZO (novelo): Unua premio: V.A. Glazunov (Soveta Unio) pro *Ho mia kor'*; Dua premio: Valdemar Vinař (Ĉeĥoslovakio) pro *La insulo de la neresanig-*

*ebloj*; Tria premio: Raymond Gonin (Francio) pro *La rufolino*.

TEATRAĴO: Unua premio: Stefan MacGill (Nederlandio) pro *Blovas en la vent'*; Dua premio: Bernard Golden (Hungario) pro *Tagiĝa ordalo*; Tria premio: Bernard Golden pro *La lingvo de d-ro Sopiranto*.

ESEO (Premio Luigi Minnaja): Egaldivide al Marie Bartovská (Ĉeĥoslovakio) pro *Komo kaj Ernő Császár* (Hungario) pro *Neglektita dulingveco*.

PORINFANA LITERATURO: Unua kaj dua premioj ne aljuĝitaj; Tria premio: Vesna Skaljer-Race (Jugoslavio) pro *Kial*.

FOTOGRAFIO: Unua kaj dua premioj ne aljuĝitaj; Tria premio: Zdravko Nikolov (Bulgario) pro *Paŝo en la pasinteco*.

NOVA TALENTO (Pokalo Harabaĝiu): Terttu Tyynelä (Finnlando) pro la poemo *Iu memportreto*. Pli detala raporto de la prezidanto de Belartaj Konkursoj aperos en nia oktobra numero.

bra kaj tradicia kongresa publiko. Božena Zborowska en sia unuhora recitalo ĝuis la helpon de flutisto kaj de la admirinda harpistino Gražina Janus, kiu ludis plurajn sol-pecojn. Vera malkovro de la muzika parto de la Kongreso estis la belga pianisto Geert Dehoux, kiu en sia lastmomente aranĝita piankoncerto proponis altnivelan interpreton de klasikaĵoj (Chopin, Schubert) kaj modernaj, cerbostreĉaj verkoj (Skrjabin). Bonaj programeroj devus nepre ĝui bonajn teknikajn kondiĉojn, kio en la kazo de Dehoux ne okazis (la fortepiano ne estis perfekte agordita, kaj la tabureto knaris dum la tuta koncerto). Janet Enghardt kaj Hans Lindén ĉefrolis en alia muzika programo, kiu sub la nomo "Sveda bukedo" okazis la antaŭlastan tagon de la kongresa semajno. Novspeca aranĝo en Stokholmo estis la programero "Vagabonda muziko", en la ĵaŭda posttagmezo. La celo estis (kaj parte oni atingis ĝin) doni eblecon al muzikaj amatoroj serĉi sian publikon en neformala aranĝo, sen podio kaj sen anticipe planita programo. Ankaŭ en tiu aranĝo, same kiel en la Interkona kaj Junulara Vesperoj, aperis la admirinda sveda vagabonda kanzonisto Roland von Malmberg.

## Kelklinie pri...

**INTERKONA VESPERO:** Ĝi estis novstila. Anstataŭ tiu tradicia babilaraĝo kun iom da muziko, ĉi-jare la ĝenerala direktoro de UEA, d-ro Victor Sadler, publike intervjuis pli ol 40 reprezentantojn de la landaj asocioj. Oni aŭdis multajn novaĵojn pri la landa agado. Inter la salutintoj kaj intervjuitoj troviĝis ankaŭ Ba Jin (Bakin), kiu gvidis la ĉinan delegacion en Stokholmo, Komence kaj fine estis iom da eblecoj renkontiĝi kaj danci. Manko: la vespero daŭris tro longe. Tamen, ripetinda eksperimento.

**DOKUMENTOJ:** Riĉa dokumentujo kun bela Kongresa Libro kaj la broŝuroj *Kion diri kaj kiel* kaj *Kion manĝi kaj kie*. Enestis speciala numero de *El popola Ĉinio*, pluraj prospektoj, urboplano, poŝta tarifo, fasko da svedlingvaj informiloj pri Esperanto (por disdono) ktp.

**AKCEPTOJ:** Tiu por honoraj gastoj okazis en la Kongresa Libroservo, tiel ke la eksteruloj povis almenaŭ supraĵe informiĝi pri la Esperanta literaturo. En aparta akcepto UEA regalis centon da membroj de Societo Zamenhof. Al la Urbodomo de Stokholmo estis invitita milo da kongresanoj, kiuj ĝuis ne nur la belecon de la konstruaĵo sed ankaŭ la plej abundan regalon de post la viena kongreso en 1970. Pluraj ambasadoj aranĝis akceptojn por sialandaj kongresanoj.

**BANKEDO KAJ BALO:** Ambaŭ okazis en la ekskluzivaj ejoj de la Urbodomo, la Bankedo en la Ora Salono, la Balo en la Blua Halo. Oni ne memoras pli konvenajn (kaj pli belajn) ejojn por ĉi tiaj kongresaranĝoj. La Bankedon partoprenis 375 personoj, kontraŭ tre alta prezo de 78,00 guldenoj, sed kun ekskluziva menuo kaj altnivela servo. En la Balo kolektiĝis la tuta kon-

gresanaro. La orkestro estis profesinivela, ĝia programo varia.

**INFANOJ:** 28 geknaboj el 13 landoj partoprenis la 18an Internacian Infanan Kongreseton en Elvskogen, 30km sude de Stokholmo. La loko estis rava, prizorgantoj abundis, ludejoj svarmis, kaj la partoprenantoj pasigis escepte agrablan kaj utilan semajnon. Ni klopodos poste skribi pli detale pri la Kongreseto.

**GAZETARA SERVO:** Pri ĝi plendas la kongresanoj, ne la svedaj gazetaroj kaj aliaj amaskomunikiloj. Prave ĝi koncentris sin je la ekstera informado kaj ekfunkciis plurajn monatojn antaŭ la Kongreso. Tial al la gazetara konferenco venis trideko da personoj, al kiuj parolis ankaŭ la Alta Protektanto. Pro la amasa raportado nacilingva, al Sveda Esperanto-Federacio venis preskaŭ 500 informpetoj. Ulla Luin respondecis pri la tuto. Thomas Bormann ankaŭ ĉi-jare redaktis sian *Kongresa kuriero*. Pli da sistemeco en la funkciado de la Servo ne malhelpus, sed oni ne ŝanĝu ĝiajn nunajn prioritatojn.

**JUNULARA VESPERO:** Kvankam ĝi okazis en io, kio apenaŭ nomiĝas ejo (temis pri interna fermita korto de la liceo, kiu servis kiel dua kongresa konstruaĵo), la spontana etoso, neformaleco kaj bone improvizita programo vicigas ĝin inter la plej sukcesajn erojn de la kongresa programo. Okazis ankaŭ aparta programo sub la nomo "TEJO sin prezentas".

**LIBROSERVO:** Memserva vendejo laŭ la lucerna modelo pasintjare. Tre taŭga, preskaŭ luksa, ejo. Riĉa elekto de titoloj (ĉ. 650). Perfekta prizorgo (helpe de komputilo!), sub la gvido de Derk Dam kaj Marianne Westman, nome de la sveda Eldona Societo Esperanto. Kvankam la prezoj estis altaj (pro la absurda sveda imposto de 20%), la intereso estis granda kaj la vendoj atingis la sumon de ĉ. 75 000 svedaj kronoj (proksimume 34 500 gld). Ĝi ne estis nur riĉa vendejo, sed ankaŭ bela kaj vidinda ekspozicio. Necesas aktualigi la arkaiĝan kontraktomodelon laŭ kiu oni organizas la kongresajn libroservojn.

**SVEDA LINGVO:** Plurdeko da kongresanoj partoprenis ekspresan kurson pri la sveda lingvo. Ĝin kompetente gvidis dum la tri unuaj kongresaj tagoj (po 1,5 horoj) Ingrid Maier. Bonvenas similaj aranĝoj estonte.

**AŬKCIO:** Nova ideo kaj tre bona sukceso. Lerte kaj vigle (precipe en la komenco) gvidis ĝin Tomas Jansson, kiu sukcesis vendi centon da plej diversaj objektoj (ĉefe libroj) por preskaŭ 4 000 svedaj kronoj. La rekordan prezon de 500 kronoj atingis la Kongresa Libro de la 1-a UK en 1905. Neta profito, favore al la Fondaĵo Azio-Afriko, estas 3 475,00 svedaj kronoj (ĉ. 1 600,00 gld).

**FAKAJ KAJ ALIAJ KUNSIDOJ:** Trideko da fakaj asocioj okazigis kunvenojn en Stokholmo. Plimulto havis organizan karakteron kaj traktis jarraportojn, elektis novajn respondeculojn, planis estontan agadon. Okazis ankaŭ aparta Asembleo de Fakaj Asocioj, medicinistoj festenis en speciala bankedo, kaj radioamatoroj funkciigis dumkongresan radiostacion.

Aparte okazis dudeko da aliaj kunvenoj, kiuj traktis ĉefe la diversajn laborkampojn de UEA mem, kaj ni tie ne kalkulas la multnombrajn kunsidojn de la komitataj komisionoj. Al pluraj el tiuj fakaj kaj aliaj kunsidoj ni revenos en niaj postaj revunumeroj. Unu tamen meritas apartan mension ĉi-foje: "Enkonduko al la hodiaŭa Esperanto" estis speciala kunveno por svedaj lingvistoj al kiuj la Internacian Lingvon prezentis Blanke, Vilborg kaj Wells (ĉiu parolis en sia gepatra lingvo). Ankaŭ tio ĉi estis nova programero, kiun ne forgesu la estontaj kongresaj organizantoj.

**EKSKURSOJ:** Ĉirkaŭ 1 100 kongresanoj partoprenis en sep diversaj dum- kaj post-kongresaj ekskursoj, kiujn aranĝis la LKK. Ili estis bone organizitaj sed multekostaj, kiel cetere ĉio en la kongresa lando.

Tamen, la intereso pri la ekskursoj estis tia, ke preskaŭ ĉiuj elvendiĝis antaŭ la komenco de la Kongreso. Tio signifas, ke multaj ne povis partopreni la ekskursojn. La oficiala Antaŭkongreso okazis en Gdańsk (Pollando), dum unu el la postkongresaj celoj estis la norvega ĉefurbo Oslo.

**KLERIGAJ PROGRAMOJ:** Kelkdeko da personoj partoprenis la progresigan kurson (kvarfoje po 1,5 horoj), sub la gvido de P. Rados. Ĉe-metoda veterano A. Weide gvidis apartan seminarion por la instruantoj laŭ la rekta metodo de Andreo Cseh.

**EKSPOZICIOJ:** L. Åberg aranĝis belan ekspozicion pri la laboro de UN kaj Unesko rilate al diskriminacio. En la Libroservo estis ekspoziciitaj lignaj komponaĵoj de la jugoslava pentristo S. Novak.

## SOLENA FERMO:

# Alporti la oficejojn al la membraro

GRÉGOIRE MAERTENS, la nova prezidanto de UEA, malfermas la lastan ĝeneralan kunvenon de la 65a UK kaj atentigas, ke li intencas sekvi la ĝisnunan evolutendencon de la Asocio. Maertens elstarigas du gravajn elementojn de la nuntempa strategio de UEA: "alporti la oficejojn kaj instancojn de la Asocio al la membraro, al la landaj asocioj, al la kontinentoj" kaj "resti plene malfermita al la eksterstarantoj, al la homoj, kiuj ne volas organiziĝi, sed volas labori por la antaŭenigo de Esperanto".

Post la prezento de la podianoj, la nova ĝenerala sekretario de UEA, d-rino F. Szabó-Felső, koncize raportas pri la kongresaj laboroj, kaj la vicprezidanto Corsetti prezentas la kongresan kaj komitatajn rezoluciojn. Amri Wandel legas saluttelegramon de la israela registaro, kiu enhavas i.a. jenon: "La ideo de la Internacia Lingvo Esperanto enkarnigas la aspiron por mondo en kiu kunestas kompreniĝo kaj amikeco inter

homoj kaj popoloj." L. Åberg salutas nome de Monda Asocio de Mondfederalistoj, kaj oni legas skribajn salutojn de: Virina Internacia Demokratia Federacio, Internacia Esperanto-Muzeo, Ekologia Rondo Esperantista, San-Marina Esperanto-Grupo, Teo Jung, R. Molera kaj L. ÓhUiginn. Per silenta ekstaro la kongresanoj omaĝas al la forpasinta honora membro Ŝihej Mijake. La alia vicprezidanto de UEA, B. Ragnarsson, komunikas la rezultojn de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj, kaj oni informas ankaŭ pri la tradukkonkursoj franca, finna, germana, itala kaj pola.

Maertens adiaŭe aprezas la estraranojn, kiuj ne plu kandidatis por siaj ĝisnunaj postenoj: Auld, Bormann, Pettyn kaj Støp-Bowitz. La prezidanto anoncas la nomojn de la nove elektitaj membroj de la Honora Patrona Komitato kaj de la novaj honoraj membroj de UEA (vidu la p. 151) kaj invitas la ĉeestantajn el ili al la podio (Denoël, Klemola). Aplauĉe oni salutas ankaŭ la aliajn honorajn membrojn en la salono. Al la podio estas invitataj tri elstaraj movadaj figuroj el Svedio: T. Morariu, J. Strönné kaj K. Söderberg (li ne ĉeestis). Agrabla surprizo montriĝas "Internacia Kanthoro", kiu organiziĝis dum la kongresa semajno, sub la gvido de la bulgara muzikisto Dimitar Terziev. Du kantoj de la koruso enkondukas tiun longan liston de la kongresaj dankoj: al la ŝtataj kaj urbaj funkciuloj kaj instancoj, al la programintoj, LKKanoj, helpantoj ktp. Abundas floroj kaj libroj. Oni apenaŭ trovas pliajn fortojn por aplaŭdi. La LKK ricevas apartan donacon de ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

Fine venas tiu tradicia solena momento de la transdono de la Flago. La prezidanto de la LKK, Roland Lindblom, parolas lace sed sprite: "Ni akceptis organizi la Kongreson en Stokholmo, ne por ke ni laboru, kaj vi venu ĝui la restadon ĉi tie, sed, ĉar ni volis utiligi vin reklamcele. Vi estas parto de nia informa laboro." Enivaldo Alves Silva, vicprezidanto de la venontjara LKK, promesas klopodojn "fari ĉion eblan por organizi kiel eble plej belan 66an UK". Oni kantas la himnon kaj Maertens formartelas la kongresan semajnon en Stokholmo: "Ĝis Brazilo en 1981!"



La Flago pretas por sia 35a (?) vojaĝo. Maldekstre: liberiĝa rideto de R. Lindblom; dekstre: invitaj mienoj de la brazilanoj — Cunha (kun la Flago), Neima kaj Enivaldo.

## Kongreso vekis grandan interesiĝon de la finna loĝantaro

DUM LA PLI AĜAJ HOMOJ ankoraŭ pakis siajn valizojn, semajnon antaŭ la Universala Kongreso, 332 gejunuloj el trideko da landoj jam kongresis apud la Balta Maro en Rauma, loko de la ĉi-jara IJK. La plej norda kongreso de TEJO ĝis nun okazinta tamen surprizis ĉiujn pro la varmega vetero. Post pluraj grizaj monatoj en Eŭropo, multaj partoprenantoj foje aprezis la sunon pli ol la programon.

Tiu cetere tre finneca programo klare montris, ke la IJK tute ne kateniĝas de jaro al jaro je unu kliŝa formato. La formaleco de la finnoj kaj la neortodoksaj en- kaj el-litiĝaj horoj (ambaŭ fruaj) ĝenis noktemulojn, sed la kondiĉoj por laboro kaj distro estis tute komfortaj, kaj oni baldaŭ al kutimiĝis al la programa ritmo. Multaj elektis ŝviti ne nur en kunvenoj sed ankaŭ en stranda saŭno, kaj kombini tion kun naĝado en la maro. Oni naĝis ankaŭ dum la ekskurso, kiu estis duporta: matene per aŭtobusoj al la malnova urbo Laitila, kie oni vizitis bienon kaj agrable malvarmetan preĝejon, kaj posttagmeze, per boatoj, explore tra la insularo de Rauma. Se la aŭtobusoj pro la vetero tro similis al la saŭno, la malstreĉa marumado poste estis bela rekompenco.

Okazis la kutimaj vesperoj interkona, internacia kaj adiaŭa, kaj al tiu lasta aldoniĝis subĉiela kataluna festo, kiu daŭris ĝis matenmanĝo. Unu vespero estis aranĝita laŭ la modelo de finna "iltamat", kaj en la literatura vespero fama finna kantisto, M.A. Numminen, kantis en Esperanto. La ĉi-jaran dramon prezenton surscenigis Finna Esperanto-Teatro: *La fervojo*, de la finna verkisto Juhani Ano.

La kongresa temo estis "Popola tradicio en la nuntempa mondo", kaj oni traktis ĝin, interalie, en la prelegoj pri: "Papua kulturo", "Historio de popolkulturoj", "Popola medicino", "Kulturo por la cigana popolo", "Japanaj tradicioj", "Antila kulturo", "Kiel popolo fariĝas nacio" kaj "La etnografia scienco en Finnlando". Sed la temo estis des pli populara, ĉar ĝi donis bonajn okazojn ankaŭ por distro. La japanoj kontribuis per poezio kaj paperfaldado (origamo), dum oni multe ĝuis lumbildan prezenton pri la japana popolkulturo kaj la modernigo de tiu lando. Tio spegulis la ĝeneralan emfazon de la temaj diskutoj, kiuj koncentris sin ĉirkaŭ la malgraviĝo de popolaj tradicioj en la modernigo kaj internaciigo de la nuntempa vivo. La kongresa rezolucio, fine de la semajno, atentigis pri rolo de Esperanto kiel harmoniiga ponto inter etnismo kaj internaciismo, je praktika nivelo.

Samtempe kun la Kongreso okazis en Rauma la ĉiujara "Puntosemajno", pro kiu la urbo estas vaste

konata. Ĝi donis festan etoson ĉie, kaj kreis tre konvenan fonon por laboroj pri la popoltradicia temo de la IJK. Efektive, la lokaj instancoj traktis la IJK kiel parton de la urba festo, kaj la finna televido venis filmi por speciala duonhora programo pri la Kongreso. Ke profesiaj televidistoj venas al IJK kun tia celo, estas io tute nova, kaj eble la ĉefa atingo de LKK kaj



de Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO). Ni esperu, ke tiu programo pozitive influos al la finna publiko pri Esperanto. Estus bele, se la 36a IJK en Rauma estus memorata ne kiel kongreso, kiu bone distris siajn partoprenantojn (kvankam ĝi tion faris), nek kiel la loko de gravaj diskutoj pri TEJO en la venonta jardeko (kvankam tio ĝi estis), sed kiel la unua IJK, kiu vekis grandan reagon ĉe la ordinara loĝantaro de la lando, kie ĝi gastis. Se la 36a IJK povos tiel helpi al la agado de FEJO, tio estos nur justa, ĉar ĝuste al la finnaj gejunuloj ŝuldiĝas ĝia sukceso.



### Raporto pri estonteco

Estas nun aĉetebla la raporto pri la Seminario de TEJO en Strasburgo. La 48-paĝa presita kaj ilustrita raporto titoliĝas "Internacia komunikado: aplikado de Esperanto". Ĝi prezentas ampleksajn resumojn de la ĉefaj prelegoj (de

# Maratone — ĉu bone?

LA KOMITATO de TEJO kunsidis en Rauma dum entute tridek horoj, kaj pro sia eltenemo la komitatanoj gajnis ĝeneralan admiron. Sed, ĉu tiom da horoj efektive necesis? Neniu pretendus, ke la labormaniero de la Komitato estas ideala, kaj certe pli firma proceduro ebligus pli rapide tralabori la tagordon. Tiucele, do, oni nun petis al komisiono ekzameni la proceduron, cele al plibonigo.

Aliflanke, oni havis multon seriozan por preparoli, kaj finfine gravaj diskutoj devis okazi ekster la kadro de la Komitato, ĉar simple ne estis loko por ili en la tagordo. Dank' al tre diligenta laboro de la redakta teamo,



## ESTRARO DE TEJO:

**Prezidanto:** Csaba Lendvay, Hungario (eksteraj rilatoj, kunordigado)

**Vicprezidanto:** Brunetto Casini, Italio (edukado de gvidantoj, TEJO-butiko)

**Vicprezidanto:** Amri Wandel, Israelo (landaj sekcioj, regiona agado)

**Ĝenerala sekretario:** Thomas Bormann, FR Germanio

**Estrarano:** Marianne Böckmann, Belgio (varbado)

**Estrarano:** Ian Jackson, Britio (eldonaĵoj, servoj)

**Estrarano:** Tomasz Jan Kudrewicz, Pollando (turisma servo, faka agado)

**Estrarano:** Michael Lennartz, Germana DR (landaj sekcioj kaj regiona agado en orienteŭropaj landoj)

**Estrarano:** Bob Venhuizen, Nederlando (financo, kongresoj)

la kongresanoj jam havis antaŭ si la raporton pri la strasburga seminario (vidu nian julian/aŭgustan numeron, p. 123) kaj el tri kunvenoj pri la flanktemo "Esperanto en la okdekaj jaroj" rezultis neoficiala "manifesto de Rauma", tamen subskribita de multaj kongresanoj. La Komitato mem devis dediĉi pli da tempo al ellaboro de nova kongresa regularo, kio estas agnosko, ke la ĉiujara IJK viciĝas inter la plej gravaj



i. a. Piron, Gacond kaj Corsetti) kaj de la sekvaj demandoj, respondoj kaj diskutoj. Ĝi traktas varbadon, instruadon, movadan organizigon, kongresojn, aplikadon de Esperanto kaj eksterajn rilatojn. Ne restu ekster la fluo. Mendu ekzempleron nun de la Libroservo de UEA. Prezo: 5,10 (por Nederlando 5,30) gld.

agadoj de TEJO kaj meritas multe da horoj en la komitata tagordo.

Du estraranoj anoncis sian demision. Stefan MacGill lasis la estraron post ses jaroj por fariĝi direktoro de la Centra Oficejo de UEA/TEJO. Dum du jaroj li estis vicprezidanto, kaj ekde julio 1979 li gvidis la Organizon kiel ĝia prezidanto. Neniu, kiu vidis la amplekson de liaj dosieroj aŭ trovis lin laboranta en la CO je noktomezo, subtaksos lian kontribuon al ĉiuj aspektoj de la agado de TEJO; kaj neniu, kiu rimarkis lian popularecon ĉe junaj esperantistoj de ĉiuj tipoj, supozos, ke tiu kontribuo estos baldaŭ forgesita. Ankaŭ Zdravka Metz retiriĝis pro la premo de sia profesia laboro, kaj Marianne Böckmann kaj Tomasz Jan Kudrewicz estis alektitaj en la estraron. La nova prezidanto de TEJO estas Csaba Lendvay. Pri la nova taskodivido en la estraro, vidu la kadron ĉi-supre.

Raportis el Rauma: P. Weatherby, Y. Bellefeuille, I. Jackson

## Kongreseroj...



W. kaj E. Bormann apartenas al la plej okupitaj movadaj familioj. Nu, jen tamen ilia komuna foto el Stokholmo.

### Estro de la bazono

"Apud d-ro Wells sidas s-ro Roland Lindblom, kiu estas prezidanto de ĉi tiu tuta bazono ĉi tie. Nome, li estas prezidanto de la Loka Kongresa Komitato." Tio estis vortoj de d-ro Tonkin en la Solena Inaŭguro. Ni aldonu, ke Lindblom estas la prezidanto ankaŭ de Sveda Esperanto-Federacio.

### Solene malplena seĝo

Meze de la podio en la Solena Inaŭguro estis malplena seĝo rezervita por s-ro Rutger Palme, urbestro de Stokholmo. Kvankam oni publike anoncis telefone ricevitan informon, ke la urbestro "estas survoje kaj venos post kelkaj minutoj", la seĝo restis solene malplena ĝis la fino. Ĉu la urbestro pentis pro tiu foresto kaj, ĉu pro tio la regalo en la urbo-doma akcepto estis tiel reĝstila?

### Ĝiceta mikspoto

Tre malofte la kongresejoj proponas tian abundon da spaco por la ĝicetoj, kiel okazis en Stokholmo. Komence oni eĉ utiligis tiun spacon. Poste, ial, ĉiuj kongresaj ĝicetoj kunfandiĝis en unu grandan mikspoton. Tien nun necesis iri pro la rendevua tabulo, novaj aliĝoj, unutagaj karto, poŝto, informoj, bildkarto, T-ĉemizoj, invitiloj ktp. ktp.

### Belgo el Francio

Harri Melasniemi gvidis la Internacian Vesperon kaj demonstris al ni iom da profesinivela sinteno sur la

scenejo. Li atentigis nin ankaŭ, ke la mikrofono estas nek sovaĝa besto de kiu necesas timi, nek bombono kiun oni manĝu. Tamen, la lango de Harri ial ofte misfunkciis. Li eble eĉ ne konsciis, kiel fatala eraro estas anonci flandron kiel francan. Li faris tion prezentante la belgan pianiston Geert Dehoux, pro kio la lingvosentemaj belgoj verŝajne ne invitos Melasniemi gvidi similan aranĝon en Antverpeno post du jaroj.

### Ne tuŝu la teknikajn!

La gejunuloj revenis tute entuziasmaj de la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Finnlando. Oni laŭdas ĉion, de la organizantoj ĝis la finna vetero. La sola laŭta plendo koncernas la sloganon "Ne tuŝu la teknikajn!" Ĝi pendis ĉie: ĉe fenestraj ŝirmiloj, fortepiano, televidaj kameraoj ktp. Ĝia vera signifo kompreneble estis: "Ne fuŝu la teknikajn!". Feliĉe, iu diris, finnoj ne konsideris la litojn, tablojn kaj seĝojn esti teknikajn.

### Kiu troige fervoris?

Ankaŭ la stokholma Kongresa libro ripetis la kutiman atentigon ne forgesi preni sian poŝton kaj aliajn proprajn antaŭ ol forlasi la kongresejon. Nu, iu tro fervore sekvis tiun atentigon kaj enpakis du elektraĵojn skribmaŝinojn, luprenitajn por la kongresa semajno. Nek ni nek la stokholma polico certas, ke en ĉi tiu kazo temas pri esperantisto.



Tomas Jansson viglis kiel gvidanto de la Aŭkcio. Fakte, li montriĝis tute ruza vendisto. Se li profesie estas kuracisto, kie li lernis la ruzon? Espereble ne en sia profesia vivo.

### Ĉeftemo "Esperanto"?

"Diskriminacio", la ĉeftemo de la 65a UK, ricevis ekscesan atenton en Stokholmo (v. la paĝon 146). Ni kalkulis, ke preskaŭ duono de la disponebla labortempo dum la kongresa semajno konsumiĝis de la tem-pritrakto. Tre bele, noble kaj utile. Tamen, en Stokholmo ne restis sufiĉa tempo por okupiĝi pri la Internacia Lingvo. Necesas do, ke unu el niaj baldaŭaj ĉeftemoj estu "Esperanto".



Ĉu malĝusta homo gratas sian nukon? Sur la foto estas la nova prezidanto de UEA, G. Maertens (maldekstre), kaj la ĝisnuna prezidanto, H. Tonkin, kiu evidente nun ne scias kion fari post la liberiĝo de la prezidantaj zorgoj. Ĉu la problemoj de la Asocio ebligas al ni foti baldaŭ Maertens en kapgrata pozo?

## Anoncetoj

**TARIFO:** Ĉiu vorto kostas 0,80 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem. Ili bonvolu memori, ke ni ne donas rabaton pro la ripetado de la anoncetoj.

**Inter la 25a de septembro kaj la 1-a de decembro** forestos la direktoro de la Centra Oficejo, Stefan MacGill. En tiu periodo anstataŭos lin la ĝenerala direktoro, d-ro V. Sadler.

**Ekspozicio de infandeseĝnaĵoj.** Libera temo. Dorse skribu nomon kaj aĝon. Ni rekompencos laŭdezire. Esperanto-Grupo, Str. Forn 19, Moyá (Barcelona), Hispanio.

**Sugestopedia materialon** (Lozanov-an metodon) por instrui Esperanton serĉas: Hervé Daoust, 405 Delamontagne, Rouyn (Québec), Kanado, J9X 5J8.

**Vojaĝonte al Anglujo**, 23-jara studento serĉas tiea(j)n persono(j)n, kiu(j) povos provizi lin per malmultekosta loĝado kaj parttempa laboro. Skribu angle aŭ Esperante al Abelardo Giménez, Colombes 44, 3<sup>o</sup> 31, RA-1177 Capital, Buenos Aires, Argentino.

**Tutmonda Esperantista Adresaro:** Ĉiu Esperantisto, ĉiuj esperantistaj asocioj, entreprenoj ktp. aperigu

siajn adresojn en TEA – tio kostos neniom al ili! Vi devas nur plenigi kaj resendi respondilon, kiun ni sendos al vi kontraŭ unu internacia respondkuponon. Info-Servo, Bismarkstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

**Esperanto en radio:** Ĉu vi legis la artikolon "Kiel argumenti por pliaj elsendoj?" en la aprila revunumero? Rigardu al tiu teksto kaj, se la dua cifero de via poŝtkodo, bankkonto aŭ pasporta numero estas 9 aŭ 0, bonvenus, ke vi nun skribu pri Esperanto-elsendoj al kelkaj radio-stacioj. Ek!

**Registaroj de la mondo!** Ne plu mortpunon! J.P. Beleznai, Nederlando.

**Membroj de Rondo Harmonia**, tutlanda organizo en Japanio, deziras korespondi pri diversaj temoj tutmonde. Sendu leterojn al: Yamaguti Sin'iti, Kiri 2-1-24 Wako-so, Matumoto-si, 390 Japanio.

**Korespondemuloj:** Sciigu viajn nomon, adreson, sekson, ŝatokupojn/interesojn por senpaga aperigo en la internacia bulteno de nia Koresponda Servo. Amity International, (EKS), Post Box 10, Visakhapatnam-530 001, Hinda Unio.

**Filologoj**, aliĝu al IUEF. Jara kotizo de 5,50 gld. (pageblaj al poŝtĝirkonto 1156545 de R. Moerbeek, v. Speykstr. 28<sup>l</sup>, 3014 VL Rotterdam, Nederlando) inkluzivas 4 numerojn de *Filologo*.

## Savu nin

per starigo de la  
**SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!**

### ♦ Esp/31

Intelekte, rilate al la politiko, la homaro havas la formon de fiŝo: inter la kapo kaj la vosto troviĝas la plej granda parto de la korpo. Sed la kapo reprezentas la superan minoritaton, kiu estas pli sperta ol la meza plimulto pri la politiko; la vosto reprezentas la minoritaton malsuperan, la postrestintojn en la politiko. La amaso en la mezo konsistas el individuoj, kies kompetento maturiĝis en iu el la miloj da fakoj aliaj ol la politiko, kaj kiuj estas do pli-malpli politike analfabetaj. Ambaŭ ekstretoj estas for de la meza amaso, kiu ne kapablas distingi inter la ekstretoj de supereco kaj malsupereco, kaj kiu do taksas ambaŭ same: stranguloj. Tial ĉarlatanoj ofte aspektas al tiu amaso pli kompetentaj ol la efektivaj kompetentuloj. Per superdemokrata sinteno oni povas sin defendi kontraŭ tiaj misjuĝoj.


### ♦ Esp/32

*La opinio de la plejmulto sinonimas al tiu de laikeco, nome en ĉiu ajn specifa kampo. La politika kampo antaŭ ĉio. La opinio de vera kompetentuloj estas ĉiam for de la amaso da cerboj tiubranĉe laikaj. Krome, normale, tiu laikeco signifas mankon eĉ de la fakaj bazoj, kiuj necesas por kompreni sen-erare (t.e. ne miskompreni) tion kion diras konanto de la fako al sambranĉaj kaj samnivelaj personoj. Ĉu individuo, kiu ne priscias la ekziston de la kvar fundamentaj matematikaj*

*operacioj, kapablas kompreni instruiston klarigantan praktike la teoremon de Pitagoro al homoj, kiuj milfoje uzis tiujn operaciojn? Ne postulu kompreni for de viaj fako kaj nivelo!*

### ♦ Esp/33

Senutile estas, unuflanke, proklami ofte kaj laŭtvoĉe la Homajn Rajtojn, kaj, aliflanke, neglekti la tujan malsovaĝigon de la politika agado. Ĉi tiu neglekto praktike nuligas la efektiviĝon de tiuj proklamoj. Precipe, neniu speco de registaro povas praktike respekti kaj respektigi la Rajton je Vivo, ĝis la sovaĝeco de la politiko, kiu kaŭzas malrespekton al tiu rajto, definitive malaperos. Nur kiam la homaro transformiĝos en harmonian orkestron, bone funkciantan, la Homaj Rajtoj povos esti ankaŭ konkrete respektataj kaj respektigataj de politikaj estroj. Ĝis tiam, tiu ebleco absolute mankas. Ĝis tiam, eĉ se ili estos centoble pli laŭte proklamataj, tiuj distruptitaj rajtoj restos nur provizora iluzio.



**MONDHARMONIIGA INSTITUTO**  
VIA SPORT 18, I-40065 PIANORO, ITALIO

ĈU VI JAM MALKOVRIS ĈI TIUN  
UNIKAN PERIODAĴON EN LA  
INTERNACIA LINGVO?

# MONATO

internacia magazino sendependa

Eldonanto: Torben Kehlet / STAFETO  
Ĉefredaktoro: Stefan MAUL

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu  
kajeroj jare. Jara abono: 49,50 gmk aŭ  
800,- b.fr. La abonon bonvolu sendi rekte  
al la eldonejo: TK/STAFETO p.v.b.a.,  
Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Bel-  
gio. Poŝtĉekkonto je la nomo de la eldon-  
ejo estas: 000-0422856-33.

Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de "MONATO",  
petu provekzempleron kontraŭ du internaciaj re-  
spondkuponoj. (Vi tamen memoru, ke unu persono  
povas nur unufoje fari tian peton). Antaŭdankon!

Se ĉiuj, kiuj tion volas, povus pagi sian  
kotizon, UEA HAVUS DUOBLE PLI DA  
MEMBROJ!

Fondaĵo Canuto  
estas praktikado  
de solidareco  
kaj amikeco

Eble ankaŭ vi povas helpi al unu el tiuj  
esperantistoj, kiuj ne havas eblecon sendi  
la membrotizon pro transpagaj malfaci-  
laĵoj!? Pagante vian propran kotizon,  
sendu donacon de unu membrotizo al  
FONDAĴO CANUTO de UEA. Vi povas  
indiki la nomon de persono, kiun vi volas  
membriĝi, aŭ lasi la elekton al la Centra  
Oficejo de UEA.

**KORAN ANTAŬDANKON** nome de  
nova membro de UEA pere de FONDAĴO  
CANUTO!

Kopirajto © 1980, CASTERMAN



## TINĈJO

### La Krabo kun Oraj Pinciloj

Eldonisto

Disvendado

CASTERMAN & ESPERANTIX

Aperos fine de novembro 1980. La vendoprezo inkluzivas  
la ekspedokostojn: 25,00 fr. fr.

L'ANĈPERIODO — mendante antaŭ 1980 11 15 vi ricevos  
rabaton 15% por unu ekzemplero, 25% por kvar ĝis 99 kaj  
33% por pli grandaj mendoj; EKSPEDOKOSTOJ  
SENPAĜAJ!

PAGOJ — per poŝtĉeko aŭ internacia poŝtmandato (Pĉk.  
ESPERANTIX Paris 2007.47 J), per franca bankĉeko aŭ  
eksterlanda Eŭroĉeko en francaj frankoj. Se tiuj pagmani-  
eroj ne eblas, sendu bankĉekon de via lando, sed bonvolu  
aldoni 10% por bankkosto.

MENDOJ — en Francio, Andoro kaj Monako nepre ne  
afranku vian poŝtaĵon, sed aldonu unuaklasan afrank-  
koston al via rimeso.



POŝTADRESO:

ESPERANTIX

LIBRE-RÉPONSE 8538-75S

F-75742 PARIS CEDEX 15

FR-FRANCIO

Mendu tuj!

TELEGRAMOJ:

ESPERANTO PARIS

TELEKSO: 250 303 PUBLI PARIS ESPERANTO

